

Bulgara Esperantisto

Novembro 1991



ENHAVO

- 3 Esperanto eniris la Pedagogian Altlernejon en Vraca (G.I.)
- 4 Someraj Esperanto-Kursoj en Pisanica
- 6 UEA kongresos en Aŭstrio
- 8 Influo de la slavaj lingvoj en Esperanto (N. Uzunov)
- 1 Eсперантски Вестник: Чуговишно, налу? (Н. Алексеев)
- 11 Pri la nuntempa E-literaturo kaj ties kritiko (I. Ertl)
- 13 Originala verkaro: Marija P. Angelova

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA

Redakcia konsilantaro: Dimitar HAĜIEV, Georgi MIHALKOV, Kiril VELKOV, Krastju KARUCIN, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Poŝtadreso de la redakcio: "Ĥristo Botev" 97, 1303 Sofio - Bulgario, tel. 31-87-75

Ofsetpresejo ĉe Firmao "Pres-Esperanto", str. "Angelov vrâh" 23, Sofio.

Al la kunlaborantoj: Kontribuojn por la koncerna numero ni akceptas unu monaton antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario "Bulgara Esperantisto" estas abonebla per la poŝto kontraŭ 36 lv. Por aliaj landoj - pere de naciaj poŝtoj kaj UEA (kodo: prsp-r) aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 ned. gld. aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por eksterlando pagita ĉe la redakcio de "BE" estas 50 lv. Prezo de unuopa ekzemplero 3.00 lv. aŭ 3 ned. gld.

"Bulgara Esperantisto" tutjare estas abonebla ĉe Firmao "Pres-Esperanto".

REKLAMTARIFO

1 paĝo	1/2 paĝo	1/4 paĝo	1/8 paĝo
712 lv.	356 lv.	178 lv.	89 lv.
990 gld.	495 gld.	247 gld.	123 gld.

La Redakcio de "BE" aperigas reklamojn en diversaj lingvoj ofertitajn de bulgaraj aŭ eksterlandaj entreprenoj, organizoj aŭ personoj. Maklerajo por havigo de reklamoj 20%. Movada rabato 50%. Ekstera kovrilpaĝo kostas 50% pli. Rabato por tuja ripeto 20%.

"Bulgara Esperantisto" havas abonantojn en 57 landoj.

Represo el "BE" permesata, indiko de la fonto bezonata.

Estas organizita regula surbendigo de "Bulgara Esperantisto" por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Novjara familia etoso.

Foto: Kirilka SAVOVA

ESTRARO

de Bulgara Esperanto-Asocio

Petar Todorov, prezidanto (internacia agado, financoj)

Venelin Mitev, vicprezidanto (kultur-informa agado)

Kiril Velkov, vicprezidanto (instrua, scienca agadoj)

Prof. Kiril Popov, ano (faka agado, neesperantistaj organizoj)

Ljubomir Trifonĉovski, ano (junulara kaj teatra agadoj)

Georgi Mihalkov, ano (E-kulturdomoj)

Svoboda Damjanova, ano (ĉefdelegito de UEA por Bulgario)

Enjo Enev, ano (terminologia agado)

Adreso: Bulgara Esperanto-Asocio, bulv. "Ĥr. Botev" 97, BG-1303, Sofio, tel. 31-00-29, 32-40-68

Niaj perantoj

BELGIO

Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000
ANTWERPEN

BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo, Caixa
Postal 11-1105,
70084-BRAZILIA-DF

BRITIO

Paul Hewitt, 26 Highfield Road,
North Thoresby, Great Grimsby,
SOUTH HUMBERSIDE DN36
5RT

FRANCIO

**Federation Esperantiste du
Travail**, 115, Rue Beranger,
F-92320 CHATILLON

**Union Francaise Pour
L'Esperanto**, 4 Bis, Rue de la
Crisaie, F-75004 PARIS

HISPANIO

Jorge Moragues Penella, Pintor
Domingo 2-2, 46001 VALENCIA

IRLANDO

Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, DUBLIN 6W

JAPANIO

Yoshiaki Mizuno, Hanazono
1-2418-18, TOKORAZAWA, 359

JUGOSLAVIO

Zoran Murgovski, ul. "Dame
Gruev" 65, YU-96000 OHRID

PORTUGALIO

Portugala Esperanto-Asocio,
A.S. Almeida, R. Dr. Joao
Couto, 6, r/c.A, P-1500 LISBOA

SUD-AFRIKO

C.S. Beckford, P.O. Box. 1227,
CAPE TOWN, 8000

USONO

**Esperanto League for North
America, Inc.** P.O. Box 1129, EL
CERRITO, CA, 94530

Jaro 60

N-ro 11

Bulgara Esperantisto

FONDITA EN 1919, ORGANO DE BULGARA ESPERANTO-ASOCIO

JU PLI DA FINANCOJ, DES PLI DA ŜANCOJ

Post la somera ripozo la Estraro de Bulgara Esperanto-Asocio decidis fari pli grandan kunsidon por detale pridiskuti la problemojn de BEA. La tagordo estis sufiĉe ampleksa, sed prioritaton havis la financaj problemoj de BEA kaj la demandoj ligitaj al la propraĵoj de BEA, unu el kiuj estas la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica, kie daŭre restas pluraj nesolvitaj problemoj, tial la prezidanto de BEA inĝ. Petar Todorov decidis kunvoki la estraranojn en IEK-Pisanica, por ke ili ĉiuj konatiĝu kun la malfacila situacio en la plej granda materia bazo de BEA.

La kunsido okazis la 4-an kaj 5-an de oktobro 1991. Ĉeestis Petar Todorov - prezidanto, Venelin Mitev - vicprezidanto, Kiril Velkov - vicprezidanto, Kiril Popov, Georgi Miĥalkov, Ljubomir Trifonĉovski kaj Svoboda Damjanova. Forestis nur Enjo Enev, kies partoprenon malhelpis gravaj oficaĵoj.

Petar Todorov detale kaj precize informis la estraranojn pri la nuna financa stato de "Globus". Jam naŭ monatojn "Globus" ne povas transpigi la subvencion al Bulgara Esperanto-Asocio pro gravaj ekonomiaj malfacilaĵoj. Multaj el la entreprenoj de "Globus" ne povas realigi siajn produktaĵojn kaj la plua ekzisto de tiuj ĉi entreprenoj estas duba. La prezidanto, inĝ. Petar Todorov, kiu estas estro de "Globus", ne povas en la nuna

ekonomia stato garantii la subvencion al Bulgara Esperanto-Asocio.

La novelektita estro de "Pres-Esperanto" Venelin Mitev - vicprezidanto de BEA, prezentis iom pli optimisman raporton rilate al "Pres-Esperanto". Laŭ li je la fino de la jaro "Pres-Esperanto" havos ian gajnon, tamen ĝi tute ne sufiĉos por la realigo de la aktualigita buĝedo de BEA, kiun la Komitato akceptis dum sia kunsido en Veliko Tarnovo la 13-an de julio 1991.

Laŭ la skribe prezentita raporto de "Majak" en Veliko Tarnovo evidentiĝis, ke ĝi ankaŭ suferas pro ekonomiaj problemoj kaj de "Majak" BEA ne povas atendi subvenciojn.

Post detalaj pridiskutoj de la financaj statoj de "Globus", "Majak", "Pres-Esperanto" la estraranoj konstatis, ke nun finance Bulgara Esperanto-Asocio troviĝas en ege malfacila stato. La sola solvo estas, laŭ la decido de la Komitato de BEA, pridiskuti la strukturon kaj etatliston de CO de BEA kaj konkrete decidi pri nova strukturo de la Centra Oficejo.

La estraranoj longe diskutis profesie kaj kun granda respondeco la problemon kaj strebis trovi la plej precizan kaj humanan solvon je jura vidpunkto, por ke la oficistoj en la Centra Oficejo de BEA ne suferu pro la nunaj ekonomiaj malfa-

cilaĵoj en la lando. Estis proponitaj kelkaj variantoj.

La Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica same troviĝas en ege kriza stato. Jam de monatoj la ĉambroj en la Kursejo malplenas. Mankas ripozantoj, mankas kursanoj. La mebloj malnovas, la ilaro en la kuirejo estas difektita. La Internacia Esperanto-Kursejo bezonas grandan sumon por almenaŭ parta renovigo. La subvencio devas veni de Bulgara Esperanto-Asocio, kiu tamen nun ne havas sufiĉe da mono.

La direktoro de IEK-Pisanica Svetoslav Kukudev certigis la estraranojn de BEA, ke dum la pasintaj tagoj li sukcesis ligi kelkajn kontraktojn, kiuj verŝajne helpas la Kursejon eliri el la kriza situacio.

Malgraŭ ke ni, esperantistoj, estas idealistoj, nun la financoj diktas la ŝancojn.

La konstruo de la Esperanta Domo en Sofio ne progresas. Ĝia neleĝa ekkonstruo fare de la estinta Buroo de BEA ege malfaciligas la novan Estraron, kiu nun preskaŭ nenion povas entrepreni el jura vidpunkto. Estas urĝe serĉataj eblecoj por daŭrigo de la konstruado de la Sofia Esperanta Domo.

La problemoj ligitaj kun la scienca, kultura kaj organiza agadoj de Bulgara Esperanto-Asocio pli malpli estas en sufiĉe bona stato.

La Estraro akceptis la detalan raporton de Bulgara Esperanto-Teatro, kiu en aŭgusto sukcese gastrolis dum la Kongreso de Itala Esperanto-Federacio en Torino. Sukcese kaj altnivele estis organizita la Internacia Somera Esperanto-Universitato en Veliko Tarnovo.

Tamen la Someraj Esperanto-kursoj en Varna fiaskis. La kursanoj en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica ĉi somere estis ege malmultaj kaj tial la kursoj ne estis efektivaj.

La Estraro konstatis, ke la respondeculo pri la instrua agado en la Centra Oficejo de Bulgara Esperanto-Asocio ne plenumis siajn taskojn.

La Estraro aprobis la novan statuton de Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko. La Estraro akceptis novan regularon

pri la eksterlernejaj Esperanto-kursoj, kiu aperos en "Bulgara Esperantisto".

Estas fondita regula fako "Interlingvistiko" en la Pedagogia Altlernejo en urbo Vraca. La estraranoj pritraktis la proponon pri la fondo de filio de la Akademio Internacia de Sciencoj - San Marino, en nia lando. Baldaŭ membroj de la Estraro de BEA persone renkontiĝos kun la rektoro de la Sofia Universitato "Sankta Kliment Ohridski" prof. Nikolaj Genĉev por konkretigo de la propono. Estis aprobitaj novaj membroj de la Komisiono pri la jaraj premioj de Bulgara Esperanto-Asocio sur la kampo de literaturo, tradukarto, ĵurnalistiko, teatro kaj scienco por 1991. Ili estas: Stefan Ĉirpanliev - verkisto, prezidanto de la Komisiono, Stojĉo Stojĉev - sciencisto, Nikola Pilev - poeto kaj tradukisto, Dobrinka Zagorova - lektorino pri Esperanto en Ŝumena Universitato kaj Pepa Boĵanova - prezidantino de la Esperanta societo "Danuba Stelo" en Svištov.

La Estraro akceptis la buĝeton de la Internacia Danuba Esperanto-Renkontiĝo, kiu okazos novembre en Svištov. Estis aprobita same la buĝeto de la Literatura Sekcio de Bulgara Esperanto-Asocio, kiu dum la lastaj tri jaroj estas unu el la plej aktivaj Esperanto-sekcioj. Ĝi ne nur organizas gravajn landajn konferencojn, renkontiĝojn, seminariojn, sed ankaŭ entreprenis la organizon de unu el la plej prestiĝaj internaciaj Esperantaj literaturaj aranĝoj, la 11-a Internacia Literatura Forumo, kiu okazos fine de junio 1992 en urbo Vraca.

La Estraro aprobis la eldonplanon de Bulgara Esperanto-Asocio por 1992. Aparte menciindas, ke kelkaj titoloj el la nova eldonplano estos subvenciitaj ne de Bulgara Esperanto-Asocio, sed de esperantistoj kaj de Esperantaj Kulturaj Domoj, kiuj havas rimedojn. Ekzemple la Esperanta Kulturdomo en urbo Razgrad unua proponis sian subvencion por konkreta libro.

Georgi MIHALKOV,
proparolanto de la Estraro de BEA

Esperanto eniris la Pedagogian Altlernejon en Vraca

La universitata instruado de Esperanto delonge havas firmajn tradiciojn. Dank' al la klopodoj de pluraj esperantistoj la Lingvo Internacia estas instruata en la universitatoj en Budapeŝto, Pekino, San Francisko, Sofio kaj en aliaj urboj en diversaj partoj de la mondo.

En iuj universitatoj Esperanto estas fakultativa studobjekto, kiel ekzemple en la Universitato "Sankta Kliment Ohridski" en Sofio, en aliaj ĝi estas dua regula fako kiel en Budapeŝta Universitato, en San Francisko Esperanton oni instruas seminare ktp.

La instruformoj diversas, tamen unuan fojon en Bulgario Esperanto fariĝas regula studobjekto en la Pedagogia Altlernejo en urbo Vraca. Grandan meriton pri tio havas d-ro art.sc. Emil Pavlov, kiu instruas en la Pedagogia Altlernejo, d-ro sc. Kiril Velkov - vicprezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio kaj la konata dramaturgo de Vraca pupteatro Ljubomir Trifonĉovski - membro de la Estraro de BEA.

Tiu ĉi triopo kontaktis la direktorinon de la altlernejo docenton Zlatka Petrova kaj prezentis detalan projekton pri la enkonduko de la Lingvo Internacia en la pedagogian edukadon. La direktorino kaj la tuta estraro de la altlernejo pozitive rilatis al la propono kaj de la 1-a de oktobro 1991 startis la fako "Interlingvistiko" en la Pedagogia Altlernejo en Vraca.

Dum la inaŭguro de la nova studjaro, gastoj de la instruistoj kaj la gestudentoj en la altlernejo estis prof. d-ro Kiril Popov, d-ro sc. Kiril Velkov, Venelin Mitev - vicprezidanto de BEA kaj Ljubomir Trifonĉovski.

Post la emociaj enkondukaj vortoj de Emil Pavlov, la gestudentojn salutis docento Zlatka Petrova, kiu emfazis la gravecon kaj la bezonon de la nova fako en la altlernejo. Kiril Popov detale kaj riĉenhavem parolis pri la signifo de Esperanto kaj pri ĝia vasta utiligo en la nuntempa vivo. Kiril Velkov klarigis la esencon de la ĉefaj studobjektoj: Esperanta literaturo, Esperanta historio, sociaj aspektoj

de Esperanto kaj interlingvistiko. Ljubomir Trifonĉovski kore salutis la gestudentojn kaj bondeziris al ili multajn sukcesojn en la studado.

La fako "Interlingvistiko" en la Pedagogia Altlernejo en Vraca estas grava atingo kaj sukceso ne nur por bulgara, sed por la tutmonda Esperanto-movadoj. Ĝia starto en Bulgario elokvente montras, ke pedagogoj, lingvistoj, literaturistoj bone komprenis la signifan rolon de la Lingvo Internacia en la nuna mondo, kiam la homoj jam deziras vivi kaj agi kune sen lingvaj kaj sociaj baroj.

Dum kvar jaroj la gestudentoj en la Pedagogia Altlernejo en Vraca estos feliĉaj bonege ellerni la lingvon de nia nuntempo kaj konatiĝi kun la historio de la Esperanta movado, kun la valoroj de la juna, sed riĉa Esperanta kulturo. Ili estos la unuaj, kiuj poste edukos la novajn Esperanto-generaciojn en nia lando.

Ankoraŭfoje la bulgaraj esperantistoj iĝis pioniroj en nobla kaj grava iniciato.

G. I.

NI GRATULAS


Por plibonigi la laboron de siaj firmaoj kaj pro pli granda financa kaj organiza respondec, dum sia kunsido de la 5-a de oktobro 1991, la Estraro de Bulgara Esperanto-Asocio decidis: inĝ. Petar Todorov - prezidanto de BEA, fariĝas direktoro de "Globus", Venelin Mitev - vicprezidanto de BEA, fariĝas direktoro de "Pres-Esperanto".

Bulgara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko apartiĝas kiel memstara institucio de BEA kaj ĝia direktoro fariĝas Georgi Mihalkov - membro de la Estraro de BEA.

La redakcio de revuo "Bulgara Esperantisto" elkore gratulas la novelektitajn direktorojn, dezirante al ili sukcesplenan kaj fruktodonan laboron.

"Bulgara Esperantisto"

SOMERAJ ESPERANTO-KURSOJ EN PISANICA



Ĉi-somere en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica estis silente. Oni ne povis imagi, ke antaŭ unu jaro en julio kaj en aŭgusto tie estis pli ol cent kvindek gekursanoj. En la ĉambroj mankis liberaj litoj, en la klasĉambroj mankis liberaj seĝoj kaj vespere en la dancejo amuziĝis amaso da junaj, simpatiaj homoj, kiuj tiam venis el la tuta lando por lerni la mirindan lingvon Esperanto.

Kio fakte okazis en la somero de 1991? Unue, la granda ekonomia krizo ne preterpasis Bulgaran Esperanto-Asocion. Draste altiĝis la partoprenkotizo por la someraj Esperanto-kursoj, pro tio la kursoj el dudektgaj fariĝis dekduktgaj. Krome la kursoj okazis nur en aŭgusto, kaj ne kiel antaŭe - en julio kaj en aŭgusto. Trie, Bulgara Esperanto-Asocio pro financaj kialoj jam ne povis eĉ parte subvencii la gekursanojn.

Post ĉi tiuj gravaj ŝanĝoj, la Estraro de BEA bone komprenis, ke ĉi-jare la Esperanto-kursoj en Pisanica ne havas ŝancon, tamen la Estraro decidis okazigi ilin.

Kiel kutime por la someraj kursoj en IEK-Pisanica, la Estraro invitis spertajn konatajn lektorojn. Pluraj el ili, eksterlandanoj, verŝajne ne kuraĝis ĝuste nun veturi al Bulgario, sed

Maria Antonia Ladalardo el urbo Sao Paulo - Brazilo, akceptis la inviton kaj venis en nian landon. Kiel oni atendis, la aliĝintoj al la kursoj, vere estis malmultaj. De la 1-a ĝis la 12-a de aŭgusto ili estis nur 17. Tamen estis formitaj tri kursoj - duagrada, triagrada kaj instrurajta.

La duagradan kurson gvidis la talenta juna E-instruistino Maria Antonia Ladalardo. La trian kaj instrurajtan kursojn gvidis Kremona Baceva kaj Georgi Mihalkov. Evidentiĝis, ke la tempo ne sufiĉas, la streĉeco estis granda. Ili instruis kaj antaŭtagmeze, kaj posttagmeze, kaj iliaj penoj vere havis sukceson nur dank' al la granda deziro de la gekursanoj bone utiligi la tempon kaj serioze alproprigi la studmateriaĵon.

La aliĝintoj al la kursoj de la 14-a ĝis la 26-a de aŭgusto denove estis 17, tamen nun mankis kandidatoj por la instrurajta kurso. Tial estis organizitaj nur duagrada kaj triagrada kursoj. La duagradan kurson gvidis denove Maria Antonia Ladalardo kaj la triagradan kurson - Georgi Mihalkov. Vanja Spasova, instruistino pri Esperanto en la 8-a lernejo en Sofio, havis la bonan ideon venigi en IEK - Pisanican siajn gelernantojn, kiuj povis praktiki la lingvon en la kurso de Maria Antonia Ladalardo. Tiel la partopreno de Maria Antonia Ladalardo en IEK - Pisanica, estis por ni, la bulgaraj esperantistoj, ege ege utila.

Nun, kiam finiĝis la ĉi-jaraj Esperanto-kursoj en IEK - Pisanica, ni povas fari la konkludojn kaj ni konstatas, ke ili vere ne estas tre ĝojigaj.

La Estraro de BEA opinias, ke malgraŭ la malfacilaĵoj, la Esperanto-societoj en la lando devis helpi kaj subteni la somerajn Esperanto-kursojn. Ili devis iom pli vaste anonci ilin, aŭ la societoj povis pagi parton de la kotizo al siaj membroj, kiuj pli serioze interesiĝas pri Esperanto. La Estraro de IEK - Pisanica, faris nenion por informi pri la kursoj. Tie, en IEK - Pisanica, neniu el la oficistoj parolas Esperanton kaj tio forte endanĝerigas la ekziston kaj la

funkcion de la tuta Kursejo.

Evidentiĝis, ke la dekdu taga kurso ne sufiĉas por serioza instruado kaj venontjare ni devas detale pripensi la organizon de la someraj Esperanto-kursoj, por ke ili vere estu efikaj.

Estis facile nuligi la ĉi-jarajn somerajn Esperanto-kursojn en IEK - Pisanica, tamen la Estraro de BEA denove manifestis kuraĝon kaj montris, ke pli facile estas nuligi ol daŭrigi la jam ekzistantan tradicion. La Estraro elektis la

duan vojon - daŭrigi, sed bedaŭrinde la Esperanto-societoj kaj la membroj de BEA ne sufiĉe kategorie apogis sian Estraron en tiu ĉi malfacila momento, tamen la ĉi-someraj Esperanto-kursoj en IEK - Pisanica, okazis kaj tio estis sukceso!

Apartan dankon meritas nia kolemino Maria Antonia Ladalardo, kiu preskaŭ dum unu monato laboris kun granda amo kaj entuziasmo.

"Parto de mia koro restas en Bulgario"

Intervjuo kun Maria Antonia Ladalardo

- Maria, bonvolu unue prezenti vin por la legantoj de revuo "Bulgara Esperantisto".

- Mi profesie estas bioke-miistino kaj Esperante ĉefe okupiĝas pri la junulara movado en nia lando. Speciale plaĉas al mi legado, muziko kaj vojaĝado.

- Kiam vi komencis lerni Esperanton?

- En oktobro 1980.

- Dum via restado en Bulgario, vi vizitis plurajn Esperanto-societojn, vi konatiĝis kun multaj bulgaraj esperantistoj, kion vi opinias pri la bulgara Esperanto-movado kaj kiaj estas la diferencoj inter bulgara kaj brazila Esperanto-movadoj?

- Mi konsciiĝas, ke bulgara Esperanto-movado nuntempe travivas malfacilajn kri-
zajn momentojn. Tiuj malfacila-
lajoj, kiel ekzemple manko de

mono, estas delonge konata de ni, brazilanoj. Tutcerte Esperanto-movado en Bulgario estas pli strukturita kaj disvastigita ol en mia lando. La ĉefa diferenco estas tiu, ke ĉe ni Esperanto-movado estas subtenata de esperantistoj, dum ĉe vi ekzistas aliaj financaj rimedoj.

- Kion vi opinias pri la Esperanto-instruado en Bulgario?

- Mi ne sukcesis tre profunde kontakti la bulgaran Esperanto-instruadon. Mi ĝenerale opinias, ke mankas modela instruado en la lando, tiel ke la niveloj de la instruistoj kaj la kondiĉoj varias, tio same en nia lando okazas.

- Kia estas laŭ vi la lingva nivelo de la bulgaraj esperantistoj?

- La lingva nivelo estas varia, kaj pro la varia nivelo de la Esperanto-instruado, kaj nature pro la lernantoj mem. Speciale atentigis min la forta

tendenco al krokodilado, tiel rare la komencantoj havas oportunon ekster la klasĉambro praktike kaj ĉiutage uzi la lingvon kaj perfektigi rilate al ĝi.

- Ĉu via restado en Bulgario iel helpis al vi?


- Sendubel! Ĝi estis por mi nemezureble riĉa sperto kaj tutcerte parto de mia koro restas en Bulgario. Dankegon al la respondeculoj de BEA pro la oportuno tion travivi kaj al la bulgaraj esperantistoj pro la varma kaj ĉiea karesa akceptado.

- Kiaj estas viaj estontaj planoj rilate la Esperanto-movadon?

- Mi planas disvastigi miajn travivaĵojn en Bulgario kaj helpi la praktikan starigon de kontaktoj inter Bulgario kaj Brazilo, kaj nepre reveni en Bulgarijon por la Internacia Junulara Kongreso en 1993 en Vracal

Georgi ILIEV

UEA KONGRESOS EN AŬSTRIO



KONGRESO

Post la kongresoj de 1924 kaj 1936, ni esperantistoj estis lastfoje en Vieno en 1970. Jen do la kvara, rekorda fojo, ke Vieno donacas unu sian someran semajnon al Esperantujo (25.07-1.08.1992). La 77-a Universala Kongreso okazos en tempo de grandaj ŝanĝoj en tuta Meza Eŭropo, kaj ĝi estos ankaŭ iusence komuna kongreso de la movadoj en tiu regiono: krom la Loka Asista Komitato, kunlaboros internacia teamo el la najbaraj landoj. En la lastaj jaroj, la aŭstria movado baraktis kun niaj tradiciaj problemoj, kiel maljuniĝo de la aktivuloj kaj malkresko de la publika intereso. La kongreso espereble helpos ĝin fortiĝi kaj kreski, baldaŭ regajnonte sian iaman renomon kaj influon.

Ni ne neglektu mencii, ke la kongresejo de la 77-a UK estos unu el la plej modernaj kaj taŭge ekipitaj kiujn ni ĝuis ĝis nun. Speciale alloga estas ĝia situo, meze de la domaro de Unuiĝintaj Nacioj en Vieno kaj nur ok minutojn for de la urbocentro per rekta metroa ligo.

AŬSTRIO...

...iama politika, nuna turisma grandpotenco. Ĝi foje regis, reĝis, imperiestris, ĉefrolis en Eŭropo. Ĝi regas ankaŭ nun sur alia tereno: la arto adaptiĝi kaj trovi sian lokon en nova mondo. Landeto fakte, kiu fariĝas landego

ĉiusomere pro turistaj invadoj al la vienaj kaj salcburgaj festivaloj, kaj ĉiuvintre pro insbrukaj skiejoj, aŭ tutjare pro kialo ia, ekzemple en 1991 pro la Jaro de Mozart. Landego ankaŭ laŭ kulturo kaj intelekto: ĉi-jarcente jam dudeko da nobelpremiitoj, inter ili la esperantisto Alfred Hermann Fried (1864-1921, pacpremio 1911).

La aŭstria Esperanto-movado havas longan historion. Jam en 1902 aperis la unua Esperanto-revuo en la tiama Aŭstro-Hungara regno; en 1903 Fried (jam menciita) eldonis faman lernolibron; la postan jaron okazis la unua nacia kongreso de esperantistoj. Aŭstroj estis en Bulonjo, ili partoprenis en la fondo de UEA, kaj ankaŭ ili spertis la tragedian baton, kiun alportis la milito. Poste ili evoluis ĝis unu el la plej signifaj movadoj de Eŭropo - aparte laŭ la nivelo de siaj aktivuloj. El tiuj, du iĝis eĉ mondaj figuroj. Eugen Wuster (1898-1977), la fondinto de la internacia normigo-scienco, multe kontribuis ankaŭ al la frua esperantologio, dum gvidanto de la aŭstria laborista Esperanto-movado, Franz Jonas (1899-1974), fariĝis en 1965 la prezidento de Aŭstrio.

VIENO...

...nomo elvokiva kaj plena je signifoj. Pri kio pensi unue? Pri la fama filharmonia orkestro kaj ĝia novjara koncerto? La danubaj belo kaj bluo el la valsoj de Strauss? Mondrenomaj opero kaj teatro? Eleganta bunto de baroka arkitekturo? Historia majesto de imperiaj palacoj kaj romantikaj kasteloj? Ĉu viciĝas en la menso la psikanalizaj verkoj de Freud, aŭ la nomoj de tiuj multaj komponistoj kiuj laboris kaj kreis en la "ĉefurbo de muziko"? Mozart, Beethoven, Gluck, Haydn, Brahms, patro kaj filo Johann Strauss, Schonberg, Webern - jen sortimento de la vienanoj kies heredaĵon oni ĝuas tra la tuta mondo.

Situanta ĉe la vojkruciĝoj inter la Alpoj kaj Panonia ebenaĵo, jam en ŝtonepoko tiu loko estis loĝata. Poste keltoj baptis la urbon per la nomo Vindomina-Vindobona, el kio poste

evoluis Wenia kaj fine Wien (Vieno).

Vieno rolas kiel centro de internacia vivo, sidejo de kelkaj specialigitaj fakoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj pluraj aliaj internaciaj organizaĵoj, okazejo de multaj gravaj traktadoj en la servo de monda paco kaj kunlaboro.

Sed ĝia famo ne fortimigu vin. Vieno estas hejmeca kaj agrabla urbo. Escepte de la Alpoj, ĝi proponas ĉiujn ĝindaĵojn de la lando. Rivero, parkoj kaj montetoj atendas por ĉarmi vin; trankvilaj stratoj kaj viglegaj avenuoj altiros viajn piedojn. La enhavo de ĉiuspecaj magazenoj konkurencos por via tempo kun unikaj muzeoj kaj bibliotekoj. En deko da kvartaloj - Prater, Lobau, la montetoj Wienerwald, la bordoj de Danubo aŭ la parkoj de Schon-

brunn - vi trovos perfektajn lokojn por amuziĝi kaj ripozi.

EKSKURSOJ, ANTAŬ- KAJ POSTKONGRESOJ

Abundo da duontagaj, tuttagaj, antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj estas en preparo.

Antaŭkongreso estas planata en Prago. Tamen, eblos krome mendi antaŭ- kaj postkongresajn ekskursojn al Budapeŝto. Venos ofertoj pri 5-taga postkongresa ekskurso tra Aŭstraj Alpoj, 3-taga ekskurso al Salzburg, 2-taga vojaĝo tra Stirio kaj ties centro Graz.

El "Unua Bulteno" de la 77-a UK

UMEA SHINODA-KURACEJO

En Krakovo estis oficiale malfermita Centro pri Orienta Medicino (UMEA SHINODA-KURACEJO) omaĝe al d-ro Hideo SHINODA, jam forpasinta Honora Prezidanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio. Kunposedanto de tiu ĉi Kuracejo estas Masayuki SAIONĜI, direktoro de la Internacia Instituto de Preventa Medicina Praktiko en Tokio. En tiu ĉi Kuracejo oni aplikas metodon de s-ro Masayuki SAJONĜI. En tiu ĉi Kuracejo oni aplikas metodon de s-ro Masayuki SAJONĜI - Orientan Specialan Diinan Masaĝon, akupunkturon, ĉinan masaĝon, klasikan masaĝon kaj aliajn.

Ĉiujn malsanulojn antaŭ kuracado diagnozas kaj konsultas la polaj kuracistoj kaj ekzamenas dum kaj post kuracado por konstati efikon.

En la UMEA Shinoda-Kuracejo ni intencas kuraci malsanulojn kaj organizi multajn internaciajn kursojn pri orientaj kuracmetodoj, kompreneble en la internacia lingvo Esperanto. Niaj ĝisnunaj pacientoj estas tre kontentaj kaj dankas nian helpon.

Ankaŭ Vi mem povas sperti efikojn de kuracmetodoj aplikataj en nia Kuracejo. Por niaj malsanuloj ni povas certigi malmultekostan loĝejon en hotelo (ĉ. 4 \$). Pro tio ke nia Kuracejo mem devas pagi ĉiujn elspezojn - por kuracado ĉe ni oni devas pagi.

Interesitoj estas petataj kontaktiĝu kun UMEA SHINODA-KURACEJO koresponde aŭ telefone laŭ informoj sur la oficiala papero de nia Kuracejo.

Mi mem estis paciento de s-ano SAIONĜI kaj kelkaj kuracistoj en Krakovo kaj ni ĉiuj tre alte taksas tiun ĉi kuracmetodon. Kompreneble nombro de pacientoj, al kiuj s-ano SAIONĜI helpis, estas jam tre alta en Pollando.

Esperantistoj el la tuta mondo jam havas kuracejon, en kiu ili povos interkompreniĝi kun kuracistoj kaj terapistoj per Esperanto. Tiu ĉi Kuracejo de UMEA estas la unua en la mondo kaj Universala Medicina Esperanto-Asocio planas malfermi aliajn en diversaj landoj. I.a. ni planas malfermi alian Kuracejon de UMEA en Hungario, eble ankoraŭ ĉi-jare.

ĜENERALA SEKRETARIO de UMEA
dr. farm. Włodzimierz OPOKA

Peranto en Japanio serĉata!

Nia multjara kaj fervora peranto Yoshiaki Mizuno antaŭ nelonge retiriĝis pro personaj kialoj. La Redakcio de "BE" esprimas al li grandan dankon pro liaj ĉiujaraj klopodoj havigi ĉiam pli multe da abonantoj de nia revuo.

Urĝe estas serĉata nova japana peranto de "BE". La interesiĝantoj bonvolu sin turni al la Redakcio kaj petu pliajn detalojn.

INFLUO DE LA SLAVAJ LINGVOJ EN ESPERANTO

Parolante pri la fontoj de Esperanto oni ordinare asertas, ke la kontribuo de la slavaj lingvoj ne estas granda kaj eĉ estas aŭtoroj kiel F. Modrijan, kiuj rekte asertas, ke Esperanto konsistas ne el elementoj de diversaj lingvoj, sed ke ĝi baziĝas plejparte sur elementoj latinaj. Estas necese tamen emfazi, ke la fonto de Esperanto ne estas apartaj lingvoj, sed la tutaĵo de la hind-eŭropaj lingvoj, konsistanta el elementoj de la franca, angla, germana kaj slavaj lingvoj, unualoke el ili la rusa. Oni devas nepre menciigi ankaŭ la latinan, la grekan, la italan. Tio estas ĉefe lingvoj, kiujn konis Zamenhof mem. Sporade en Esperanto estas renkontataj ankaŭ elementoj de aliaj lingvoj. Esperanto - tio estas reflektado de la lingva bildo, kiu ekzistis en la konscio de Zamenhof.

La kreinto de Esperanto d-ro L. L. Zamenhof naskiĝis kaj vivis dum sia tuta vivo en la pola parto de la tiama Rusa Imperio. La rusa lingvo estis por li gepatra - en ĝi li lernis, plejparte legis, skribis, komunikiĝis. Zamenhof mem atestas: "Lingvo de mia gepatra hejmo estis la rusa. Plej multe el ĉio mi amis tiun lingvon, per ĝi mi edukiĝis. Mi

lernis ĝin kun granda plezuro. Mi revis iam fariĝi granda rusa poeto... Mi libere parolis nur tri lingvojn - la rusan, la polan kaj la germanan". Do kreante la fundamenton de sia lingvo Zamenhof konscie aŭ subkonscie rigardis ĉion per la prismo de rusa kaj pola lingvoj.

Sed eĉ tiuj malmultaj esperantologoj, kiuj aparte studis la kontribuon de la slavaj lingvoj en Esperanton, rimarkis nur unuopajn detalojn ne vidante tion, ke la tuta sistemo de Esperanto estas submetita al la influo de la slavaj lingvoj kaj pliparte de la rusa lingvo. Tio tamen ne malhelpis M. Duc Goninaz fari jenan aserton: "La influo de la slavaj lingvoj riveliĝas en la profundo, dum la influo de la latinidaj kaj la ĝermanaj lingvoj estas videbla sur la surfaco". Alia esperantologo V. dall' Acqua dividas: "La influo de la rusa, rekta kaj nereakta, estas pli profunda ol se tion oni povus konkludi per iu supra studado". Alia esploristo de la fontoj de Esperanto D. Gregor eĉ simple konfesas: "Malantaŭ la latina fasado sin kaŝas slava mekanismo".

Dum siaj unuaj jaroj Esperanto disvastiĝis preskaŭ

ekskluzive en Ruslando kaj tiu periodo de la E-Movado estas nomata la rusa. La unuaj E-verkistoj kaj tradukistoj same estis plejparte el Ruslando. Kelkaj el ili havis alian slavan lingvon kiel familian, ekzemple por Grabowski kaj Kabe gepatra estis la pola lingvo, sed ankaŭ ili posedis libere la rusan, uzis ĝin ĉiutage, tradukis el ĝi en Esperanton literaturajn verkojn. Tiuj aŭtoroj kune kun Zamenhof formis la modelon de vortformado, frazeologio, sintakso kaj stilistiko de Esperanto. "Rezulte de la influo de la slavaj lingvoj sur Esperanton pere de multnombraj rusaj kaj polaj verkistoj de la unua periodo la lingvo akiris grandan liberon en la stilo kaj agrablan flekseblecon en la frazo, kiujn ne posedas tiaj fiksitaj lingvoj, kiaj estas la franca kaj la angla", konfesas Edmond Privat.

Kiam la centro de E-Movado sub la malfavoraj kondiĉoj en la cara Rusio translokiĝis en Okcidentan Eŭropon, la bazaj normoj de la E-parolo jam estis ellaboritaj kaj daŭre influis la uzadon, kaj la esperantistoj el Okcidenta Eŭropo ne konante la rusan lingvon, uzis la modelojn venintajn de la rusa. "Estas logike supozi, ke se la komenca periodo de

la E-Movado okazus en Okcidenta Eŭropo. nun Esperanto aspektus iom alimaniere", asertas la sovetia esperantologo B. Kolker.

LA ESPERANTA FONEMIKO estas tre proksima al la rusa, pola, ĉeĥa, slovak, serbokroata kaj bulgara fonemiko. La vokalismo en Esperanto plejparte kongruas kun la vokalismo en la slavaj lingvoj: (a), (e), (i), (o), (u). Oni povas konstati plenan koincidon de artikulaciaj karakterizoj de la langolevado kaj aliaj apartaĵoj. Tial la internaciaj vortoj eniras Esperanton plej ofte per tiuj vokaloj, kiujn oni uzas en tiuj vortoj prenante ilin el la slavaj lingvoj.

Sekve de iuj apartaĵoj de sia morfologio en Esperanto abundas diftongoj el la tipo aj kaj oj: grandaj domoj, interesaj libroj. Tiaspecaj diftongoj estas karakterizaj ankaŭ por la rusa kaj por la aliaj slavaj lingvoj, malgraŭ ke en ili la kaŭzo estas tute aliaj morfologiaj specifaĵoj, antaŭ ĉio la finaĵoj de adjektivoj, iuj posedaj pronomoj kaj finaĵoj de iuj vortoj en kazoj: свой, мой, большой, страной, знай, мечтай ktp. Evidente la granda ofteco de uzado de tiuj diftongoj en la finaĵoj de la slavaj vortoj donis al Zamenhof modelon de formo por finaĵo de pluralo de la adjektivoj kaj substantivoj en Esperanto.

Malgraŭ ke fonemoj (c), (ĉ), (h), (j), (ĵ), (ŝ) ekzistas ankaŭ en latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj, eĉ ne en unu el

tiuj lingvoj ĉiuj ili estas prezentitaj. Tio atestas, ke ili eniris Esperanton pere de slavaj lingvoj. D. Gregor referencante al O. Jespersen asertas, ke al Zamenhof plaĉis la sibilantaj sonoj kaj diftongoj, ĉar ili estas tipaj por la slavaj lingvoj. Ekzemple la fonemo (ĥ), malgraŭ ke ĝi ekzistas en iuj latinidaj-ĝermanaj lingvoj, aperis en Esperanto kun vortoj pruntitaj el la rusa. Poste ĝi estis vaste aplikata por vortoj pruntitaj el la greka lingvo, sed nun ĝi estas ĉiam pli ofte anstataŭigata de fonemo (k): ĥemio - kemio, tehniko - tekniko, ĥinino - kinino ktp.

Esperanto uzas la latinan alfabeton, kiu estas kompletigita per du diakritaj signoj (supersignoj). La alfabeto estas fonetika, tial oni uzas la literojn por signi ankaŭ la fonemojn. La konformeco "unu litero - unu sono" kaj "unu sono - unu litero" estas rezulto de la aplikado de principo pri reguleco kaj estis enkondukita verŝajne sub la influo de slavaj lingvoj, en kiuj mankas fonografiaj signoj kaj la pozicio de literoj tre malofte kondukas al legado diversa. En la rusa, bulgara kaj la plimulto de la aliaj slavaj lingvoj ne estas ekvivalentoj de la latinaj literoj (q), (w), (x), (y) - ne hazarde ankaŭ en Esperanto tiuj literoj mankas.

Por esprimi iujn sonojn Zamenhof uzis literojn kun diakritaj signoj. Ekzemple por signi la sensilaban (u) estis uzita la supersigno (˘),

kiu laŭ la unuanima opinio de ĉiuj esperantologoj estas pruntita de la cirila litero (ѳ). Tiu diakrita signo ekzistis jam en la unua projekto de la lingvo, dum la alia diakrita signo (˙), kiu estis en la sama projekto, estis poste anstataŭita per (). Ĝi estas uzata por konsonantoj, kaj en Esperanto aperis evidente laŭ la modelo de la ĉeĥaj literoj (c) kaj (s). Zamenhof aldonas tiun signon ankaŭ sur la literojn (h) kaj (j). La sama supersigno estas uzata en la franca alfabeto, sed nur por vokaloj. Do tiel aperis la literoj (ĉ), (ĥ), (ĵ), (ŝ) kaj (ŭ).

"Tiu kuraĝa apliko de la principo pri reguleco tuj forĵetis multajn problemojn ligitajn kun la ortografio kaj same permesis la kreon de meza formo de iuj vortoj, kiuj havas tre varian formon en la latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj", asertas la sovetia esperantologo B. Kolker kaj aldonas, ke tiuj supersignoj fariĝis grava celo por atako al Esperanto, kiu ne finiĝis ĝis nun eĉ inter la esperantistoj.

Malgraŭ ke Esperanto uzas latinan alfabeton kaj la plimulto de la vortoj ne havas slavan devenon, la grafika formo de multaj internaciaj vortoj rememorigas ne nur pri iliaj prototipoj, sed ankaŭ pri la praktika transskribo de la koncernaj vortoj en la rusa, bulgara kaj la aliaj slavaj lingvoj. Tion facile pruvigas la jena tabelo, kie la Esperantaj vortoj, arbitre elektitaj, estas komparitaj kun iuj slavaj kaj latinidaj-ĝermanaj lingvoj:

Esperanto	Rusa	Bulgara	Franca	Angla	Germana
akvarelo	акварель	акварел	aquarelle	aquarelle	Aquarell
buljono	бульон	бульон	bouillon	clear soup	Fleischbrühe
cirko	цирк	цирк	cirque	circus	Zirkus

Esperanta	Rusa	Bulgara	Franca	Angla	Germana
duŝo	душ	душ	douche	douche	Dusche
kupeo	купе	купе	coupe	coupe	Abteil
kvarthalo	квартил	квартил	quartier	quarter	Stadtviertel
marŝalo	маршал	маршал	marechal	marshal	Marschall
rozo	роза	роза	rose	rose	Rose
ŝnuro	шнур	шнур	cordon	cord	Schnur
ŝoseo	шоссе	шосе	chaussee	high-way	Landstrasse
trotuaro	тротуар	тротоар	htrottoir	pavement	Bürgersteig
tunelo	туннель	тунел	tunnel	tunnel	Tunnel

ige kun tio estas interese menci la rimarkigon de V. Akulenko: "La rusa ortografio estas tre fonetika kaj permesas en 90 % de la vortoj ligi la skribon kun la prononco. Poste sekvas la germana, franca kaj fine angla ortografio". Tial la rusa formo de internaciaj vortoj plej ofte estis uzata kiel bazo de koncernaj Esperantaj vortoj, t.e. en tiuj okazoj fakte fariĝis ripeta transskribo, ĉi-foje per latinaj literoj.

MORFEMIKO. Zamenhof komencis okupiĝi pri la lingvo jam kiel lernanto en la gimnazio. La simpleco de la angla morfologio lin kondukis al la penso ne inkluzivi en sian projekton idiomaĵajn elementojn de la gramatiko.

Rezulte de tio la gramatiko de kreita de li lingvo multe simpliĝis. Sed la problemo pri simpligo de la leksiko dum longa tempo ne estis solvita. Estas konata la okazintaĵo, kiam promenantе iun tagon sur la strato la juna Zamenhof enpensiĝis antaŭ du reklamŝildoj: Кондитерская kaj Швейцарская. La egala finaĵo -ская de tiuj vortoj kaj ilia proksima semantiko lin direktis al la penso pri la grandegaj eblecoj de la afiksosistemo por konsiderinda redukto de la kvanto de radikoj en la lingvo. Komparante la rusajn derivitajn vortojn li difinis la semantikon de multaj afiksoj, ĉar la afiksosistemo en la slavaj lingvoj estas multe pli disvolvita kaj la morfemoj estas pli

facile artikigataj ol en la latinidaj-germanaj lingvoj.

Aplikante la principon de reguleco al la ideo, kiun montris al li la riĉa derivebleco de la slavaj lingvoj, Zamenhof venis al la konkludo vaste apliki la derivadon kaj doni al ĉiu afikso nur unu formon kaj nur unu signifon. Poste analogie tiu ĉi principo estis aplikita ankaŭ ĉe aliaj morfemoj. Per tiu hipotezo oni povas klarigi la devenon de la aglutineco de Esperanto ne per la influo de finno-ugraj aŭ tjurkaj lingvoj, sed per genetika-tipologia komuneco kun la slavaj lingvoj. Tion oni povas pravi per la facileco de la pomorfema tradukado en Esperanton de vico da slavaj vortoj:

Bulgara

измислица
неописуем
безмислица
преиздаден
самовъзпламеняване
ускорявам
раздвоявам се
връчвам
пренаселеност
разхвърляност
съавторство
полузабравен
съидейник

Rusa

выдумка
неописуемый
бессмыслица
переизданный
самовоспламенение
ускорить
раздвоиться
вручить
перенаселенность
разбросанность
соавторство
полузабытый
единомышленник

Esperanto

elpensaĵo
nepriskribebla
sensencaĵo
reeldonita
memflamiĝo
plirapidigi
disdubiĝi
enmanigi
troloĝateco
disĵetiteco
kunaŭtoreco
duonforĝesita
samideano

(Sekvas)

Nikola UZUNOV

ЕСПЕРАНТСКИ ВЕСТИ

ЧУДОВИЩНО, НАЛИ?



Подбалканско село. Заобиколено от планини и гори. Работливите стопани се трудят ден и нощ, та дори и в празник. Нали трябва да осигурят на децата си поне поносим живот? И тук, разбира се, има бедни и богати.

В сиромашка къщица се ражда пъргаво детенце. Радват се на първенеца в семейството майка, татко, дядо и баба. Най-вече бабата. Детето се развива добре, идва време да проходи. Бабата го крепи и то бодро стъпва. Скоро и само ще закрачи със самоуверена, макар и колеблива, стъпка на шестмесечен младенец.

Но не би! Това "скоро" въобще не настъпи...

Детски паралич осакатява момченцето: двата крака и дясната ръчичка са засегнати и не могат да му служат нормално. Момченцето е безгрижно: то няма представа как човек си служи с крайниците. Но макар и с тъпрузене то се движи насам-натам и започва да си играе и живее в своя детски свят.

Болестта не е засегнала умствените му способности. То продължава да расте, както всички деца, бодро и радостно, макар че движенията му са крайно ограничени. Когато подяква, измъква се на двора да поиграе със своите другарчета. Те се въртят около него, защото сакатото измисля разни игри и е много общително.

Но идва време за училище. Сакатото си остава вкъщи. Кой може да помисли, че това нещастно дете има нужда от образование? Пък и законът не задължава родителите му да го запишат ученик.

Изчезват другарчетата му - те вече си имат грижи в училище. Няма с кого да си играе. Става скучно. Исква да го носят в училищния двор и там да си играе с приятелчетата, когато са в междучасие. Ня-

ма какво: малкият е капризен и настоява с детска упоритост. При хубаво време било майката, било дядото го носят на гръб в училище. А бащата през това време е заминал за Америка да изкара някой долар за издръжка на семейството.


През междучасията е добре: игрите продължават. Но бие звънецът. Учениците влизат в час, а сакатото остава на двора да ги чака пак да излязат. Забелязва го един учител, съжалил го и го занесъл при другите ученици, поставил го на чина и продължил урока. Това траяло известно време. Природната интелигентност направила впечатление на учителя: неформалният ученик схващал по-добре преподавания урок, отколкото неговите редовни ученици. При това, не се задоволявал с преподаваните уроци, ами четял всеядно всичко, което му попаднело под ръка: граматика, аритметика, христоматия, закон божи и други учебници на поголеми ученици. Почеркът му е красив и четлив. Учителят се радва на успехите му.

Но идва ред на пролетните селски работи, а есенните гъждове също пречат да бъде носен редовно на училище. Майката и дядото са заети с работа, бабата е болна и не може да го носи на гръб. Момчето остава вкъщи, но продължава да чете най-безразборно вестници, книжлета и други печатни текстове, често пъти без да разбира съдържанието им. Достава му удоволствие самата възможност да чете. Съседите му услужват кой с каквото може, а има и някои, които държат вкъщи някаква популярна книга или получават по пощата вестник.

Интелектът на юношата бързо се развива. Той започва да привлича вниманието на околните. Един учител есперантист му предлага да изучи международния език есперанто и му дава своя учебник.

Макар и с доста голяма трудност (не знае например що е причастие и други граматически тънкости), новият "есперантист" се справя самичък с езика и започва усилена кореспонденция с есперантисти от страната и чужбина. Половината от селската поща е за него. За тогавашното българско село това е цяла сензация. Идват и млади, и стари да го разпитват за това, което научава от писмата си.

Всрещ младите селски чедра има и такива с будно обществено чувство. Те забелязват стихийното развитие на будния младеж и го снабдяват с прогресивна литература. Полека-лека съзнанието му се избистря, започва да се интересува системно от социални проблеми. Вълнува се и от въпросите на историята и културата. Къщата на родителите му се превръща в своеобразен селски клуб. Водят се разговори и беседи на най-различни теми. Младият общественик е в центъра на вниманието. Неговата общителност спада на хората. А животът поднася най-невероятни събития, които вълнуват цял народ.




Къщата на Трифон Христовски в село Раготина, Ботевградско

Той започва да пише дописки и статии във вестниците, влиза в полемика с изтъкнати общественици и учени. Написва брошура, която съдържа полемичните му статии по повод смъртта на Христо Ботев, тъй като не е доволен от официалната историческа версия. Написва и икономическа брошура на тема "Проблеми на селото". Облегнат на своите неопровержими впечатления и проучвания на селския бит, той разсъждава като зрял икономист и изводите му са безупречни.

Изучава историята на семейството през вековете и приготвя за печат книгата "Любов и брак". По материали на свои кореспонденти (китайски есперантисти) написва и друга книга - "Войната в Далечния изток". За съжаление, и двете ръкописа остават непубликувани: цензурата не позволява на автора да ги издаде.

А една негова художествена повест из живота на две влюбени млади селски души бива просто открадната и публикувана под името на един самопровъзгласил се за писател безсъвестен бездарник... Даже известен литературен критик се намесва публично в защита на истинския автор. О, времена, о, нрави!

Есперантската кореспонденция расте с дни и седмици. Расте и неговото сътрудничество в есперантския печат у нас и в чужбина. С името си или с псевдоними той редовно сътрудничи с публикации по важни въпроси. Влиза в спор с виден идеолог по въпроса за идеологията на Заменхоф. В един всекидневен вестник започва да печата серия статии под надслов "Моите есперантски приятели". На журналистическата му активност може да завиди всеки най-обигран журналист. И никой не знае, че тези статии, брошури и книги са дело на автор, който няма официален документ за завършен поне един клас на първоначално учи-



Френското издание на "Моят живот"

лице...

Но неговият организъм е свърталище на тежки болести, които го довършват още преди да е прехвърлил 40 години. Добре че някои приятели му предложили да напише своята автобиография. Той откликва на техните молби и я написва светкавично: за три месеца! В края на земното си съществуване той разказва просто и увлекателно за своя живот, за мъките и радостите си. Но само две седмици след като завършва ръкописа на тази своя последна книга, авторът умира. Това става през пролетта на 1944 г. Едва няколко години по-късно ръкописът вижда бял свят. Тази искрена автобиография под заглавие "Моят живот" излезе на български език в пет издания, а в превод - на есперанто и на френски език. Има и други преводи, но не е известно дали вече са публикувани. Готов е и един том с избрани негови произведения, но чака подходящ момент за публикуване.

С грижите на близки и приятели есперантисти от цялата страна родната му къща бе превърната в "Дом-музей" и се посещаваше от есперантисти и неесперантисти от страната и чужбина. А по повод на 80-годишнината от рождението му (1905-1985) бе проведено публич-

но събрание с доклад от пишещия тези редове и с проекция на документален филм за живота му. Така бе изразена почитта към живота и делото на този на-роген син, писател и публицист, виден есперантист, забележителен човек.

* * *

Драги читателю, ти може би си мис-лиш: много е хубаво, че името на този Човек с главна буква ще продължава да бъде тачено и от бъдните поколения. Не-говата удивителна воля за живот и творчество може и трябва да служи за пример на мнозина.

Да, би трябвало да бъде така, но за съ-

жаление не е: намериха се в родното му село тъмни "герои", които не могат да търпят светлия образ на този Човек. Нощем те се промъкват в празния дом-музей, чупят прозорци, разбиват врати, крадат експонати. Бухалите на реакция-та не понасят спокойно блясъка на слън-чевите лъчи!

Тези вандалски безобразия се вършат в родния дом на Трифон Христовски, в се-ло Раготина, Ботевградско.

Може би ще е добре да започне събира-нето на доброволни парични вноски за възстановяване на нанесените щети? Пишете за това в редакцията на "Bulgara Esperantisto".

Никола АЛЕКСИЕВ

ТЪРСИМ СПОНСОРИ

Литературната секция при Българския есперантски съюз търси спонсори, които да подпомогнат поне отчасти издаването на неголеми стихосбирки и сборници с разкази на пишещи на есперанто поети и белетристи.

В столетната история на българското есперантско движение са записани имена-та на много дарители, които в особено трудни моменти от неговото развитие са дали своя неогреничен принос за оцеляването и бъдещия му разцвет. Надяваме се, че и сега, когато заедно с цялата ни страна БЕС преживява тежка икономическа криза, ще се намерят щедри есперантски домове на културата, есперантски дружества и отделни наши съидейници, които ще подпомогнат финансово издаването на нови художествени произведения на стари и млади литературни творци.

Списание "Български есперантист" ще публикува редовно имената на дарителите.

Сумите изпращайте на адрес:

СОФИЯ 1303

ул. Жеко Димитров 80

Фирма "Прес-Есперанто"

PRI LA NUNTEMPA ESPERANTA LITERATURO KAJ TIES KRITIKO

István ERTL

Ĝenerala malfacilo je tutecaj pritaksoj de la E-literaturo, el kiu ajn vidpunkto, ĉiam estas la preskaŭ-neeble havi vastan trarigardon pri la materialo. Laŭ la kvanto, E-literaturo devus esti unu el la plej "ellegeblaj" literaturoj de la mondo (ekz., la pli-malpli 100 romanoj digesteblas senprobleme dum kelkaj jaroj), sed la misoj pri informado, malfuoj kaj ofte ĉefe (trans)pagproblemoj kaŭzas, ke literaturemulo devas esti persista en siaj serĉadoj, malgraŭ ofta frustrigo. Samkaŭze, preskaŭ iu ajn tezo pri "bazaj tendencoj" povus esti pravigebla, aŭ pro la nur partaj konoj de la elcerbuminto, aŭ pro lia fido je necesa duonkulturiteco de la legontoj.

Premisinte tion, mi pluu senhonte. Jam la demando-duo sugestas, ke lastatempe en nia beletro (estu premisita ankaŭ, ke en mia pri-trakto literaturo kaj beletro samas) la rakonta prozo atutis, almenaŭ superis aliajn ĝenrojn. Kaj ŝajnas esti tiel. La produkto kreskis: kvante. Kio, laŭ vulgarmarksisma tezo (sed ĉi tie akceptebla) devas naski pli-malpli frue kvaliton. Tiu kvalita salto jam okazis, dank' al libroj aperintaj laŭlonge de la 80-aj jaroj (ofte verkitaj antaŭe): fenomeno jam analizita de Osmo Buller kaj Vilmos Benczik, i.a. La suproj de tiu roman-tajdeto por mi persone estas: "La litomiŝla tombejo" de Piĉ, "Adolesko" de Vaha, "Ombro sur interna pejzaĝo" de Ŝtimec, "Regulus" de Lorjak kaj "Sed nur fragmento" de Steele. Tamen, tiuj romanoj neniel superas la nivelon de averaĝa romano en etnolingvo, krom per lingvaj meritoj ne-tradukeblaj aŭ eventuale per temo, kiun - tiel - nur E-lingva verkisto povas trakti. Pri kio temas?

Mi ŝatus kredi, ke fortiĝas en nia literaturo la tendenco de aŭtentaj E-romanoj: tiaj, kiuj ne povus naskiĝi aŭ ne povus estiĝi tiaj en alia lingvo. En "Regulus" nur ŝercaj aludoj pri SAT kaj UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto) reprezentas Esperantan fonon (tio ja ne riproĉeblas al romano pri la 17-a jarcento en

Francio). Sed tiu fono ĉe Stimec nepras, ĉe Vaha gravegas, ĉe Piĉ ne malhaveblas. Vaha kaj Piĉ raportas nur, kion E-isteco signifas inter aliaj okazaĵoj de unuopula vivo, sed Stimec revigligas la tradicion de Varankin ("Metropoliteno") kaj R. Schwartz ("Kiel akvo de l'rivero") kun la temo de "internacia amo", eble plej grava fenomeno en la privata vivo de E-isto. Pli bone dirite: "interkultura" amo, ĉar en la amo de diversoriginaj gehomoj konfrontiĝas la tradicioj de kulturoj diversaj.

Interkultureco tutmonde graviĝas en la temaro de literaturo (v. pri koneksaj pripensoj prelegskizon de mi "Eŭropo kaj E-literaturo" en Bulgara E-isto, aprilo 1990), do per tia temelekto E-o pioniras kaj eniras ĉeffluon. Mi esperas, ke mi ne voluntarisme vidas tian tendencon en la E-a verkaro.

Sed same gravas konstanta realudo al la E-a kultura tradicio, asimilado de ĝi. Kaj jen, Vaha citas en sia libro el "La Infana Raso", Steele faras same, sed pli kaŝite (ne pli demandu min, kiuloke!), ĉe Stimec oni legas la "Mastron de Korboja", Kamaĉo (ĝis nun ne menciita, ĉar konata ĉefe pro noveloj) omaĝas per fajnaj aludoj jen al Fernando de Diego, jen al Liven Dek.

Tiuj aŭtoroj vivas efektive en Esperantujo, ofte eĉ kiel profesiuloj. Tial por ili Esperanto estas ne nur ilo, sed ankaŭ temo. Ili metas al si demandojn pri la esperantista esto kaj ĝiaj potencialoj. Ĉu ge-amo, dankebla al Esperanto, kontraŭstaros la povon de tempopaso (Stimec)? Ĉu esperantistiĝo en si mem kapablas solvi la psikajn problemojn de individuo (Ulrich Matthias: Fajron sentas mi interne)? Ĉu eblas, ke esperantistoj argumentas per bomboj (Corrado Tavanti: Varmas en Romo)? Anstataŭ ĝenerale humanisma, foje dimanĉpredikeca mesaĝo (Baghy) ni havas ĉi tie vivantan literaturon pri vivanta komunumo.

Pruvo por tio estas ankaŭ, ke plifortiĝas la rilato inter verkisto kaj publiko. Ne en la plej konkreta senco: la publikan kunsidon de

EVA* en Roterdamo (1988) ĉeestis apenaŭ pli da interesigantoj ol da verkistoj. Sed kiel Baghy estis ĝenerale legata siatempe, nun ni havas niajn "tutpopolajn" aŭtorojn: Nemere kaj Valano/Piron (Lorjak same meritis tion). La ĝenerala tipo de E-verkisto estis kaj estas homo, kiu, pro manko de tempo/talento/eldonisto aperigas nur unu-du-tri librojn; ili, male, ĉiujare memorigas pri si. Ilia lingvaĵo facile sekveblas, kio ĉe Piron estas konscia strebo. En tiu ĉi alineo estu menciita la fungrapida diskresko de poramuza-krima-portrajna-leĝera literaturo, kiun eldonisto surmerkatas kun multe pli grandaj esperoj ol Sadlercan aŭ eĉ Auld-an poemaron: Deck Dorval, Tavanti, Manjo Austin, Moirand...

Eble estus tro frue kaj tro malfrue aserti, ke nunas la periodo de stabiliĝo de la literaturlingva normo. Fruas, ĉar ankoraŭ Piĉ volas havi lingvon pli komplikan ("esprimriĉan"), Ŝulco pli logikan, Piron pli simplan (pli objektive dirite, malpli elitecan sintenon de la verkistoj). Malfruas, se ni pensas pri stilistoj kiel Ribillard aŭ R. Schwartz. Sed ĝustatempe, se ni konsideras la maturan stilon de "Sed nur fragmento", kie Steele priskribas, filozofias, karakterizas kaj serĉas per varia lingvaĵo, aŭ la aŭdace eksplodajn eksperimentojn de la Kamaĉo-noveloj. Ambaŭ verkistoj ĝisfunde konas sian bazon, la lingvon tian, kia ĝi estas parolata: ĉiu vorto, kiun ili surpaperigas, situas konscie en rilato kun tiu bazo.

Lasta konstato ĉi-rilate estu, ke - logike - pli kaj pli da verkoj meritis etnolingvigon, sed tion ja ofte baras antaŭjuĝo ĉe ne-E-istaj eldonantoj. En sia escepteca situacio, Hungario sukcesis apogi la tezon precipe per "leĝeraĵoj": "Varmas en Romo" de Tavanti, "Kazinski venas tro malfrue" de Dorval, "Ŝia lasta poŝtkarto" de Elgo, "Kumeŭaŭa, la filo de ĝangalo" de Sekelj, plus eta dulingva antologio el nia literaturo aperis en la lastaj kvar jaroj. Pollando ĵus atutis per cent paĝoj, apud Vaclav Havel, en mondliteratura revuo.

Poezio meritis apartan pritrakton. Mi kredas, ke malpli facilus konstati tendencojn enties pli heterogena materialo. Tamen, tute ne pro ĝentileco mi persone elstarigus la nomojn de Nervi, Carr, Berveling, Gazizi, Ungar,

Huleŝ kaj Lozgaĉev.

IE Nepras malmiksi la nociojn de kritiko kaj recenzo. En E-ujo ili estas siamaj ĝemeloj, bedaŭrinde. Recenzo unuigas en si funkciojn, kiuj normale disiĝas en etnolingvaj kulturoj: sciigo pri apero, reklamo, gazetnivela recenzo kaj literatura kritiko kunas-apudas. Tio kompreneblas, ĉar - manke de veraj librovendejoj, bibliotekoj, amaskomunikilaj rekomendoj, ktp - krom eventuala surloka libroservo kaj amika konsilo homoj ekscias pri libroj nur el recenzoj. Tiuj do devas prezenti ankaŭ bazajn informojn pri la verko, verkanto, - se temas pri traduko - kultura fono. Laŭ la ricevita eduko tre diversas la skalo de legantoj, kaj teorie necesus kontentigi ilin ĉiujn. Sed dume recenzojn ofte verkas iu ajn el la unupersona redakcio de provincaj bultenoj, kaj tial aperas galimatioj kiel la propono kandidati William Hold (tiele!), al Nobel-premio (mi ne diru, kie...).

Sed de Diego kaj Silfer jam bone priverkis la postulojn de serioza literatura kritiko. Mi aldonu nur unu plendon kaj unu malplendon.

Mi ne plu konsterniĝas aŭdi, ke ne unu klera esp-isto legas nek Literatura Foiro nek Fonto nek ion ajn beletrecan. Sed ekzistas ankaŭ tiuj, kiuj legas nur LF aŭ nur Fonto aŭ nur ILTIS-Forumo... Tio estas simptomo bedaŭrindan disskoliĝon, koteriumadon, kiu rajtigas ĵusan ŝercan difinon en Kancerkliniko pri kultura gazeto: gazeto, per kiu intelektuloj interofendas sin. (Vidu ILTIS-Forumon pri la korifeoj de LF). Tiu fenomeno foje reflektiĝas en nia kritiko, kiam ne plu gravas la kvalito de la verko, sed la nomo de la verkinato.

Aliflanke, estas ne malmultaj, kies recenzoj kaj kritikoj, funde pritraktaj, ĉiam meritis legadon: Kris Long, Fjodorov, de Diego, Kamaĉo, Usakiewicz, Korĵenkov, Buller, Berveling, Hantpenthal, Ullmann, Nervi (hove, tro sporade), k.a. Mi ofte havas la impreson, ke kelkaj el ili, precipe el la sovetiaj kulturrondoj, estas eĉ tro klare postulemaj pri nia originala literaturo (legu la utopie-simpatie kuraĝan eseon de Fjodorov: *Survoje*)!

* Esperantlingva Verkista Asocio

Marija P. ANGELOVA

ATENDO

*La nuboj grizaj pendas pezaj
kaj elglutigas pluvon, pluvon
dum tagoj, dum la noktoj tedaj
kaj frosto stopis evoluon
de la branĉetoj kaj herboj.*

*Sub tiu premo la naturo
kolektas fortojn kaj pufiĝas
por la sekvonta aĝ' matura,
kiam ekfloros ĝi, verdiĝos -
atendas ĝi nur sunradiojn.*

*Nun mi samkiel la naturo
nur pensojn - nubojn amasigas
kaj io pufas en animo -
atendas bonan homan ridon
samkiel ĉio - sunradiojn.*

AVINO

*Sur la duetaĝa lito
du steletoj - la genepoj -
dormas dolĉe.*

*Multkoloraj ludiletoj
ridas gaje sur la bretoj -
same rondo.*

*En l'animo de l'avino
lumas lumo kaj espero
por estonto.*

*Sur la duetaĝa lito
du steletoj - la genepoj -
dormas dolĉe.*

BEBO

*Kaj la florojn, kaj la bestojn
ravas idoj.
Ankaŭ homojn feliĉigas
etulidoj.*

*Ravas bebo la gepatrojn.
Ravas ĝi geavojn siajn
ĝi alportas zorgojn, ridojn,
freŝajn fortojn kaj esperojn.*

*Ĝi lumigas tutan domon,
faras ĝin pli brua, gaja,
ĝi vigligas ĉiujn aĵojn*

*per la ploro, per la sonoj,
per rideto la plej milda,
per ekzisto sia rara.*



ĈITINA KAJ LA KATO



Ĉitina havas katon. Ĝi estas nigra preskaŭ kiel karbo. Pro tio oni nomas ĝin Kasi.

Ĉitina kaj Kasi estas grandaj amikoj. La tutan tagon ili estas kune. Eĉ ili ne disiĝas dum la nokto, ĉar ambaŭ dormas en sama ĉambro.

Do, se iufoje la knabino vekigis en la nokto, ŝi aŭdas la murmureton de la kato kaj denove ekdormas kontenta.

Nature ne ĉiam tio okazas.

Iun nokton Ĉitina vekigis. Ŝi vokis tute mallaŭte:

- Kasi!

La kato ne aperis. Ĉitina denove vokis, pli laŭte:

- Kasi!

Ŝi ŝaltis la lumon, sed ne vidis Kasi. Ĝi ne estis en la ĉambro.

Ŝi komencis serĉi en la tuta ejo. Rigardis en la keston kun la ludiloj, malantaŭ la ŝrankon, inter la librojn... Ĝi mankis.

- Ĝi estas en la ĝardeno - supozis Ĉitina. - Mi eliros serĉi ĝin.

Ĉitina trairas la koridoron, malsupreniras la ŝtuparon, malfermis la pordon kaj eliris en la ĝardenon.

Kiel malluma estas ĉio! Ŝi fermis la okulojn, ektimiĝite, kaj vokis denove:

- Kasi!

Sed ŝia propra voĉo timigis ŝin, ŝi ŝtopis siajn orelojn per manoj por nenion aŭdi kaj antaŭeniris kelkajn paŝojn.

-Kasi! Kie vi estas?

Subite ŝi sentis ektiron. Ŝajnis, ke iu tuŝas ŝian noktĉemizon. Pormomente ŝi restis senmova, kun bone fermitaj okuloj. Ŝiaj manoj ŝtopis la orelojn. Sed ŝi ne volis tiel pludaŭri. Ŝi deziris reveni hejmen kiel eblas pli frue. Atente ŝi prenis sian ĉemizon. Neniu estis. Fakte, ŝi alproĉis ĝin al unu branĉo.

Tiam ĉiuj aĵoj en la nokto ekparolis.

La steloj diris:

- Kien vi iras, knabino?

Ankaŭ la sinjorino Luno diris:

- En tiu horo la knabinoj devas esti en siaj litoj.

- Kial viaj okuloj estas fermitaj?

Ĉiuj aĵoj en la nokto silentis kaj atendis respondon.

Ĉitina diris la veron:

- Estas tre mallume kaj mi timas.

La steloj ekridis:

- Kiel vi volas vidi lumon, kun fermitaj okuloj!

Ĉitina malfermis okulojn. Ridis kontenta.

Pravis la steloj. La tuta ĝardeno estis plena je lumpunktoj. La luno, la steloj, la lampiroj, la lanterno.

Ŝajnis, ke ankaŭ la floroj brilis.

La steloj ree demandis:

- Kien vi iras?


- Kasi, mia kato, perdiĝis - diris Ĉitina.

Ĉiuj aĵoj en la nokto promesis:

- Ni helpos vin serĉi ĝin. Tiam, la steloj ekbrilis ankoraŭ pli forte, kaj la luno fariĝis ronda, kaj la vento iris al ĉiuj flankoj voki Kasi. La lampiroj lumigis la returnan vojon. Kasi, la kato, kiu estis malproksime perdiĝinta, aŭdis la voĉon de la vento kaj rekonis la odoron de la ĝardeno kaj laŭ la lumo de luno kaj de la steloj iris la vojon, kiun al ĝi montris la lampiroj. Tiel ĝi revenis hejmen. Ĉitina atendis ĝin ĉe la pordo. Kun la kato enbrake ŝi trairis la ĝardenon.

-Dankon, nokto! - ŝi diris.

Tiu historio okazis kun la kato Kasi, kiu estas



nigra preskaŭ kiel karbo. Kaj kun Ĉitina, kiu iomete havis timon.

Segun Montserrat DEL AMO
El hispana lingvo: Liliya KOLEVA

ESENCO, ROLO KAJ GRAVECO DE LA HOBIO

Mi bonvenigas la novan rubrikon "Kolektado" de BE kaj la publikigitan artikolon de N. Nikolov "Pri la kolektada hobio" (BE, n-roj 4 kaj 6/1991), kiu entenas tre utilajn kaj valorajn konsilojn pri la kolektado. Mi opinias, ke estos interese kaj utile por la legantoj esplori la esencon, la rolon kaj la gravecon de la hobio ĝenerale por la individuo kaj la socio.

Sed unue pri la termino "hobio". En la supremenciita artikolo de N. Nikolov estas uzita la termino "hobio". Ĝi devenas el la angla vorto "hobby", kiu signifas ŝatatan okupon aŭ distraĵon. Ĝi estas jam uzata en multaj eŭropaj lingvoj, inkluzive la bulgaran (hobi) kaj ĝi fariĝis jam internacia vorto. Sed en Plena Ilustrita Vortaro (PIV), aperinta en 1971 ĝi ne estas registrita. En ĝi estas donita ĉe la kapvorto "okupi" la kunmetaĵo "ŝatokupo", kiu estas glosita kiel "preferata okupo ekster la profesia". Kiel sinonimo de ŝatokupo estas donita la vorto "ĉevaleta", kiu en la ekzemplo pri ties figursenca uzo, nome "la facileco de Volapuk estas la plej amata ĉevaleta" estas klarigita kiel "preferata temo". En la slovaka lingvo estas vorto "konicek", kiu signifas ĉevaletan kaj estas uzata figursence por hobio. En la

bulgara lingvo ni ne havas vorton por hobio kaj ni uzas la esprimon *ljubimo zanimanie* (ŝatata okupo). **Hobio** estas preferebla antaŭ **ŝatokupo**, ĉar ĝi estas unu vorto kaj estas produktiva - el ĝi oni povas derivi la vortojn **hobiisto** kaj **hobiismo**. La kunmetaĵo "ŝatokupo" tamen devas resti kiel sinonimo de hobio.

Koncerne la esencon de la hobio ekzistas disputoj. Al iuj hobio sonas simplige, al aliaj - tre ĝenerale. Oni ege misuzas tiun ĉi vorton, uzante ĝin, kiam necesas kaj kiam ne necesas. Oni ŝatas multe da aĵoj, sed ĉu ĉiun el la miloj da aĵoj, kiujn la diversaj homoj ŝatas kaj faras, ni povas nomi hobion? Nature, ne. La hobio estas ŝatata, preferata okupo dum la libera tempo, per kiu la individuo akiras certajn scipovojn kaj konojn kaj pliriĝigas sian informaron pri la mondo kaj aliĝas al la aliaj homoj. Praktikante ĝin, oni ne nur pasigas utilajn kaj agrablajn horojn, sed samtempe ripozas. Pli realisma kriterio por la difino de hobio estas intelekta motivo. La hobiismo kiel fenomeno havas ankaŭ psikologiajn aspektojn: kreon de anima ekvilibro, elementon de ludo, venkon de malmultvalorecaj travivaĵoj, batalon kontraŭ la

fremdiĝo. Kelkfoje la spontanea manifestiĝo de iu interna inklino de la homo gravas tiel, kiel ekzemple la bona digestado.

En la hobio eblas atingi seriozajn rezultojn. Ĉiam pli ofte estas renkontataj homoj, kiuj havas surprize profundajn konojn pri kinologio - parto de la zoologio, kiu okupiĝas pri la hundoj. Ili distingas senerare ĉiujn rasojn kaj difinas la hibridojn kaj scias, el kiuj rasoj devenas la hibrido, ili konas la "karakterojn" de la diversaj rasoj eĉ la plej komplikajn - la apartecojn de "eduko", de dresado, de la diversaj specioj de hundoj. Grandegaj estas la konoj de la akvariistoj pri la iĥtologio. Estas hobiistoj-akvariistoj, kiuj posedas rarajn speciojn, kiuj ne videblas en la akvarioj de la zoologiaj ĝardenoj.

La hobio estas persona enlogiĝo, sed per sia kvalito ĝi akiras ankaŭ socian gravecon. En Ĉeĥoslovakio ekzemple la akvariistoj ricevas temojn de sciencaj institutoj. En Hungario la Respublika stacio de la junaj natursploroj posedas riĉan kolektaĵon el kakttoj. En sia historia evoluo kaj la arto, kaj la scienco ŝuldas multon al la hobiistoj, al la neprofesiuloj, kiuj kelkfoje atingas neatenditajn rezultojn. La sovetia verkisto

K. Andronikov diras: "Kiam ni parolas pri la kolektantoj, ni ne devas forgesi, ke la kolektanto estas la origina ĉelo de la muzeo, kaj la kolektantoj - la aktivularo de la muzeo. En la plimulto de kazoj la laboro de apartaj kolektantoj poste enfluas en la komunan trezoron de la kulturo". La malkovrinto de la antikva Trojo - Ŝliman, estas amatoro-arĥeologo. Dekoj da aliaj hobiistoj faris historiajn malkovrojn en la Malnova kaj la Nova mondoj, dum la akademianoj malrespekte apostrofadis ilin el siaj kabinetoj. Ĝuste la arĥeologio estas la scienco, kiu ne malmulton ŝuldas al la hobiistoj. La sovetia historiisto kaj literaturisto Vladimir Gruslanov elserĉis kaj kolektis pli ol 25 000 objektojn kaj la tutan riĉaĵon li transdonis al la muzeoj. La mondfama arta galerio "Tretjakov" en Moskvo estas rezulto de la kolektado de kolektantoj. Lige kun la kolektado de loteriaj biletoj de ĉiuj epokoj Vitolij Iĉanin malkovris interesajn historiajn faktojn - ekz. en 1823 la nobelo Golovik aranĝis loterion por lotumado de sia bieno Vorotnec kaj de kelkaj najbaraj vilaĝoj, en kiu la gajninto ricevis 500 feŭdajn kamparanojn. La bulgara esperantisto d-ro Boris Nedkov kiel hobiisto kolektis grandegan nombron de objektoj kaj dokumentoj,igitaj kun la Esperanto-movado en Bulgario, per kiuj li kreis la fundamenton de la Bulgara Esperanto-Muzeo. Menciinda estas la laboro de samideano Dimo Martinov, kiu dum pluraj jaroj kun senlima amo kaj zorgemo kolektis Esperantajn librojn, revuojn, ĵurnalojn, leterojn, fotojn, bildkartojn, poŝtkartojn kaj diversajn

aliajn esperantaĵojn kaj aranĝis en sia domo en vilaĝo Kran, regiono de Kazanlak, la unikan privatan Esperanto-muzeon (pri tio vidu la artikolon "Esperanta trezorejo" de G. Mihalkov en n-ro 2/1991 de BE).

La hobiismo en juna aĝo havas alian gravan socialan signifon - ĝi helpas por profesia orientiĝo. Ne estas maloftaj la kazoj, kiam hobia transformiĝas al profesio kaj tiuj ĉi homoj konsideras sin feliĉuloj, ĉar ili ordinare trovas plenan kontentiĝon en la profesio. Kelkfoje ĉio komenciĝas per bone organizita kaj lerte gvidita rondeto.

Bunta kaj multforma estas la mondo de hobiistoj. Kio igas la homon okupiĝi per tiu aŭ alia afero? La motivoj estas diversaj, ĉar ili estas difinitaj de miloj da faktoroj - kaj biologiaj, kaj psikologiaj, kaj socialaj. Dum la elekto de la profesio dependas ankaŭ de vico da objektivaj faktoroj, ĉe la elekto de la ŝatokupo la homo spontane manifestas siajn internajn inklinojn, kio estas aparte grava por la anima harmonio. La psikiatroj nomas tion psikogena efekto. Orientilo en la mondo de la homaj preferoj povas esti la tipologio de la eminenta rusa kaj sovetia fiziologo Ivan Petroviĉ Pavlov. Laŭ la specifajoj de la supera nerva sistemo li distingas tri tipojn: artisman (dominas la sentoj kaj la fantazio), pensan (dominas la emo al logikaj operacioj kaj al operaciado per nocioj) kaj mezan (miksitan).

Gravan rolon por la elekto de la hobia havas la agordiĝoj de la individuo, kiuj determinas niajn guston kaj preferojn. Kaj vere, en la granda varieco de enlogiĝoj

oni povas distingi ankaŭ tiajn sentojn kaj imagojn de la infana kaj adoleskanta aĝoj. La motivadojn de la hobiistoj ni povas similigi al grandega bukado el diversaj plantoj, ĝermintaj el la semoj de la heredaj talentoj kaj kies radikoj estas enterigitaj en la familia medio kaj iliaj tigoj estas traborintaj al si vojon, balancate de la ventoj de la socialaj influoj kaj malsame varmigite de la radioj de la disponigitaj eblecoj.

La hobia estas intime ligita kun la valorecaj orientiĝoj de la personeco. Indiko pri la ekzisto de tiu aŭ alia valoro estas la sento pri senco. Unu fojon naskite iumaniere, la sento pri senco de aparta aktivado transformiĝas en senton pri senco de difinita maniero de ekzistado kaj de tie - en propran senton pri senco de la vivo. Laŭ la viena psikoterapeŭto Viktor Frankl unu el la plej gravaj bezonoj de la homo estas la bezono atribui al sia vivo sencon kaj, se tio ne okazos, la rezulto estas specifa speco de neŭrozo, kiun li nomis noogena. Same kiel ĉiuj pasio la enlogiĝo de la hobiisto estas ties grandeco kaj malgrandeco. Li kondensas en siaj okupoj tiom da sento pri senco, ke ili fariĝas por li apogo kaj lia volonta ekzistada prizono. Kiel volonta malliberulo li sentas sin libera, ĉar li mem estas preninta decidon. Eĉ nur la fakto, ke li ne konas enuon, sufiĉas de psikologia vidpunkto.

Plue oni devas havi antaŭvide, ke la profesia aktivado ne ĉiam sufiĉas. Kial? Unue, ĉar la homo havas diversajn, eĉ kontraŭajn internajn emojn kaj ĉar ili devas trovi kampon por manifestiĝo. Due, ĉar la hobiismo estas libera je la

streso, ĉar la hobbio, kiel aktivado, kombinite kun pozitivaj emocioj kaj finkonstruita stereotipo de okupo, estas jam ekvilibriga faktoro, relativa konstanteco, oazo, kiu kontraŭstaras la rapidadon kaj la necertecojn.

Kia estas la preventa kaj la kuraca efiko de la hobbio? Antaŭ ĉio la efiko konsistas el la kreo de **pozitivaj emocioj**, kiuj en la konkurado kun la negativaj ordinare venkas ilin. Ekzemple la maltrankvileco kaj la timo ne ekzistas ĉe homo, kiu ne okupas sin per si mem, sed estas aktive absorbita de la eksteren direktita, preferata kaj agrabla aktivado. Pro tio en la programoj por superado de la krizaj statoj devige partoprenas la elemento engaĝigiteco per io direktita eksteren, venko de la fiksado sur propraj malbonaj travivaĵoj. La hobiisto iom post iom fariĝas saĝa homo. Li havas sian pasion, sian sencon kaj ne volas perdi siajn tempon kaj humo-

ron por malagrablaj bagatelajoj, t.e. li jam estas ekster la konflikto.

Alia efiko de la hobbio estas la **eduka** efiko sur la karakteron, sur la konduton, sur la estetikajn guston. La neceso esti konsekvenca fortikigas la volon kaj la senton pri respondeco kaj devo. La perfektigo de la konoj plialtigas la kulturon kaj estetikajn postulojn kaj sekve oni fariĝas spirite pli riĉa kaj pli trankvila.

La hobbio estas stabila **apogo**, je kiu la individuo povas kalkuli en sia dinamika kaj ne ĉiam facila vivo. Ĝi trankviligas, kontentigas, kreas humoron, alportadas feliĉon spite al ĉiuj malfeliĉoj, kiujn ofertas la vivo kaj igas pli facila la solvado de la nesolveblaj problemoj. En tio konsistas ĝiaj profilaktikaj funkcioj.

Sed sendube unu el la plej gravaj roloj de ĉiu hobbio estas la kreo de **mementsento**, de certeco je si mem, de sento pri

propra graveco, de sento pri solidareco kun la samideanoj, de konvinkiteco pri la "afero", de fiereco pri la atingoj, de prestiĝo pro la kompetenteco pri la difinitaj demandoj. Tamen la homo devas esti sincere malfermita al la mondo kaj ties mirindaĵoj. La natura sciamo kaj viva intereso estas potencaj faktoroj por orientiĝo, la bezono kreadi estas difinanta kaj la hazardo kaj la efiko de medio direktiĝas al tiu aŭ alia objekto, al tiu aŭ alia aktivado, al tiu ĉi nobla pasio, nomata hobbio.

Foje incite, la homo ŝanĝas sian animan statuson. Li eniras en la vicojn de la entuziasmigaj kaj engaĝitaj amatoroj. Li brulas kaj vivas en riĉa mondo, plena de feliĉaj travivaĵoj, kontenteco kaj sana vivfilozofio.

Bonan ŝancon, karaj amikoj hobiistoj!

Dimitar HAĜIEV

MISTERA LUMO

Ne cerbumu longe. Ververe "Mistera lumo" estas konata al vi. Tio estas la titolo de la novelaro de nia verkisto Julian Modest. Sed ne nur! La verkisto kaj liaj E-gelernantoj en la Sofia Universitato antaŭnelonge fondis E-societon nomitan same.

En "Mistera lumo" membras homoj de diversaj profesioj - kemiistino, oficistino, konstruteknistino, naĝtrejnistino, muzikistino, verkisto, piloto, operetkantisto, tradukisto. Ilia mezaĝo estas 35 jaroj. Psrezidantino de la nova societo estas Vesela Pavlova.

La naskita sub la signo de stelaro "Ĝemeloj" E-ido "Mistera lumo" ekpaŝis fine de junio, 1991. Tiam estis organizita vespero, dediĉita al Hindio, kie pasigis du jarojn unu el la societanoj. Li kaj lia edzino jam okazigis similan aranĝon en la sofia E-societo "Nikola Ŝopov". Ambaŭ vesperoj havis grandan sukceson. De la antaŭe pretigita enketo la aŭskultantoj eksciis multajn detalojn pri la konata plejparte kiel "malhela" Hindio: pri ĝiaj 25 ŝtatoj, multego da kastoj kaj religioj, pri tio, ke en Hindio eldoniĝas pli ol 19 000 gazetoj en 84 lingvoj, ke ĝi okupas duan lokon en la mondo laŭ nombro de sia loĝantaro, ke ĝi estas la unua laŭ eksporto de teo, ke tie loĝas pli ol 2000 tigroj kaj 216 specoj da serpentoj (el kiuj 52 estas venenaj), ktp.

La ĉeestantoj gustumis hindian teon kaj salitajn cepkuketojn preparitajn laŭ originala recepto. Sub la melodio de hindia muziko pere de amaso da diapozitivaj la esperantistoj estis transportitaj en la maŭzoleon Taĝ Mahal kaj en la kavernan templon Aĝanta, sub palmojn de ekzota Bombajo, sur bordojn de la sankta rivero Gang. Ili tenis en siaj manoj statuetojn de la multbraka Nataraj (enkorpigulo de dio Ŝiva) kaj de sanktaj bestoj, elprovis la "bloveton" de ventumilo el pavplumoj. Poste la ĉeestantoj diskutis pri la riĉa vivo de legenda Mahatma Gandhi, kies biografion lerte verkis en Esperanto la fama Edmond Privat. Estis anoncitaj adresoj de E-centroj en Hindio, kun kiuj la societanoj intencas starigi rilatojn.

Do, la E-societo "Mistera lumo" ekzistas kaj agadas. Ĝi jam havas du eksterlandajn amikojn - Maria Ladalardo el Brazilo kaj Iŝvan Ertl el Hungario. Sian lastan renkontiĝon la societanoj dediĉis al la temo pri kosmonaŭtiko kaj nifoj.

La kunvenoj de la E-societo "Mistera lumo" okazas ĉiulunde je la 18 h en la E-muzeo (Sofio, str. "Saŝo Mihov 119). Ĉiu esperantisto povus esti ĝia membro aŭ gastoj, kondiĉe ke li/ŝi neniam krokodilas, netradicie pensas, posedas iom da talento kaj multe da optimismo.

Tatjana JAROŜEVIĈ

П Р А В И Л Н И К

за извънучилищните курсове по есперанто

1. Форми и степени

1.1. Настоящият правилник урежда организацията и провеждането на извънучилищни курсове по есперанто от Българския есперантски съюз и неговите звена. Изучаването на есперанто в училищата, полувисшите и висши учебни заведения се извършва в съответствие с правилниците на съответните учебни заведения.

1.2. Извънучилищното обучение е тристепенно:

- първа степен - начален курс;
- втора степен - курс за напреднали;
- трета степен - висш курс.

1.3. Продължителността на обучение в присъствениите курсове е не повече от 68 учебни часа за всяка от степените.

1.4. Българският есперантски съюз провежда и специализирани курсове - за преподаватели, за преводачи и др., както и задочни курсове по общите програми.

1.5. За повишаване на педагогическата квалификация се организират опреснителни курсове, семинари, симпозиуми, педагогически, методически, научни конференции и др.

1.6. В началото на всяка учебна година се отчитат резултатите от изминалата и се изготвят планове и насоки за новата учебна година.

2. Ръководство на курсовете

2.1. Национални, международни и специализирани курсове от името на Българския есперантски съюз се организират по решение на Ръководството на Съюза.

2.2. Курсовете в системата на Българския есперантски съюз се водят от дипломирани преподаватели. Преподавателите в курсове за трета степен и специализирани курсове задължително трябва да имат висше образование.

2.3. Преподавателите в националните, международните и специализираните курсове се утвърждават от Ръководството на Българския есперантски съюз и имената им се обявяват предварително.

2.4. Броят на курсистите във всеки курс

не трябва да затруднява учебния процес. Препоръчва се в курс за първа степен участниците да не са повече от 20, за втора и трета - повече от 15, в курсове за преподаватели - повече от 10.

2.5. Кандидатите за курс за преподавателска правоспособност трябва да представят диплом за завършена трета степен поне с оценка добър 4.00.

2.6. Обучението в курсовете се извършва по учебните програми, утвърдени от Ръководството на Българския есперантски съюз.

3. Изпити

3.1. След приключването на всеки курс се провежда изпит, на който могат да се явят и самостоятелно подготвили се есперантисти.

Могат да бъдат провеждани и извънредни изпитни сесии при наличието на поне 10 кандидати.

3.2. Преди започване на изпита кандидатът попълва формуляр с трите си имена, дата и място на раждане, точен адрес. Тези данни се използват за протокола и дипломата (свидетелството).

3.3. Кандидатите се допускат до изпит, след предварителен граматичен тест, на който не трябва да имат повече от 50% грешки.

3.4. Изпитите се провеждат по утвърдените учебни програми на Българския есперантски съюз, като темите и тестовете за изпитите за трета степен и специализираните курсове се изпращат чрез Съюзната канцелария.

3.5. Изпитите за първа и втора степен са без оценки (kun rezulto "sukcesa").

Изпитите за трета степен са със оценки "tre bona", "bona", "kontentiga".

3.5. На всички, успешно положили изпити за първа и втора степен, се дават свидетелства по утвърден образец.

За успешно положен изпит за трета степен се издава диплома за владение на есперанто.

3.6. Българският есперантски съюз авто-

матично признава оценките от изпити по есперанто, вписани в дипломи, издадени от държавни висши и полувисши учебни заведения. Оценки до добър 4.49 се приравняват към втора степен по системата на Българския есперантски съюз, а над много добър 4.50 - към трета степен.

3.7. Българският есперантски съюз автоматично признава оценките от изпити по есперанто, проведени от ILEI/UEA. Изпитът за "elementa nivelo" по системата на ILEI/UEA се приравнява към втора степен по системата на Българския есперантски съюз, а изпитът за "meza nivelo" - към трета степен.

3.8. Други дипломи и свидетелства по есперанто, издадени в чужбина, се признават от Българския есперантски съюз, като при всеки конкретен случай се взема предвид съдържанието и обема на съответната учебна програма.

3.9. Успешно положилите изпит за трета степен, преподавателска правоспособност и лицата с признати дипломи се картотекират в Съюзната канцелария.

3.10. Удостоверенията и дипломите, издадени от изпитни комисии, в които са участвували неспособни лица, или след изпити, проведени по невалидни учебни програми или в противоречие с настоящия правилник, са невалидни.

4. Финансиране

4.1. За всеки курс по есперанто се изготвя предварителна план-сметка, която се утвърждава от организаторите му. Приходите за провеждане на курса основно се набират от такси за участие.

4.2. Размерът на таксата за участие в курса се определя от организаторите му; тя трябва да осигури неговото самофинансиране, ако няма специално предварително решение за субсидиране на този курс. Въпросът за връщане на такси за участие на отказали се кандидати за курсове се обявява предварително от организаторите на курса и е изключително в тяхната компетентност.

4.2. За явяване на изпит по есперанто се заплаща такса. Нейният размер се определя от Ръководството на Българския есперантски съюз. Редовните курсисти не плащат изпитна такса при първо явяване на изпит за съответната степен.

4.3. Възнагражденията на преподавателите в курсовете по есперанто и членовете на изпитните комисии се договарят предварително (в минимален и максимален размер). Окончателният размер на възнагражденията на членовете на изпитните комисии зависи от реалните налични средства, а на преподавателите в курсове и от крайните резултати на курса.

4.5. Финансовият дефицит от курсове по есперанто се поема от организаторите на курса. Те разполагат със средствата, получени като печалба от курсовете.

5. Заключителна разпоредба

5.1. Жалбите във връзка с организирането, провеждането и финансирането на курсове по есперанто, се разглеждат и решават от вишестоящия орган или от ревизионната комисия на звеното, организирано курса, ако има такава.

EKSPOZICIO DEDIĈE AL ESPERANTO

En la nuna ekonomia krizo kaj socia apatio la ŝumena ŝtata arkivo denove sciigis la samurbanaron, ke oni pli ofte devas trafolumi la paĝojn de la pasinteco de la regiono.

Por la ŝumenaj esperantistoj gravas, ke la unua serio de ekspoziciitaj materialoj konsistas el fotoj, dokumentoj kaj kopioj, konatigas la civitanojn kun la vivo kaj agado

de la elstara sociaganto, antifaŝisto kaj aktiva esperantisto Atanas Bojaĝiev. Sur tri belaj montrofenestroj estas eksponitaj valoraj kaj ne tre konataj sciigoj pri liaj ligoj en daŭro de pli ol 50 jaroj kun esperantistoj el la tuta mondo, pri lia granda amo al la homoj, ke ili per komuna lingvo laboru por amikeco kaj kunlaboro. Ene estas ankaŭ

malnovaj fotoj lige kun la agado de societo "Vekiĝo", kies multjara prezidanto li estis.

Por la kolekto de la materialoj kaj la aranĝo, meriton havas la specialistino en la arkivo kaj esperantistino Neli Dimitrova. Ŝi estas ankaŭ la iniciatinto por kreado de arkivo de At. Bojaĝiev.

Cvjatko TODOROV



Deziras korespondi

BULGARIO

RADOSTINA BOŠNAKOVA - 1172 Sofio, ĵ.k. "Ĉervena zvezda" bl. 3A, ap. 91 - kun samaĝuloj el ĉi pri ĉi, kolektas bk, pm.

DIMITRINA RUSEVA - 9000 Varna, kv. Ĉajka, bl. 16, vñ. G, ap. 41 - kun ĉi pri ĉi.

EVGENI EVTIMOV (35-jara) - 5250 Svištov, ul. Todor Milanoviĉ 17 - kun ĉi pri ĉi.

ĈEĤOSLOVAKIO

IRENA VERNEROVA (32-jara oficistino) -

CS-290 01 Podebrady, Kunstatska 1137/III - kun esperantistoj el Bulgario pri geografio, historio, muziko, interŝanĝas bildkartojn.

POLLANDO

HANNA WAWNINKIEWICZ (34-jara) - PL-60-526 Poznan, ul. Staszica 19/21 - kun fakuloj el la maŝinprodukta sfero el ĉi.

KRZYSZTOF MAKSYMOWICZ (44-jara kuracisto) - PL-95-035 Ozorkow 1, Skrytka 50 - kun bulgaraj esperantistoj pri ĉi.

Tra la mondo

ARTIKOLO PRI KREOL- KAJ PLANLINGVOJ

En la germanlingva gazeto "AHS" (la Generalkleriga Pli-alta Lernejo), eldonata de la aŭstria geinstruista sindikato, aperis seppaĝa germanlingva artikolo, kies titolo estas: "La nature estiĝintaj miksitaj lingvoj (piĝina kaj kreola, franca) kaj la artefaritaj mondaj help-lingvoj (Volapuk, Esperanto)". La aŭtoro estas pensiuliĝinta gimnazia instruisto d-ro Karl UHER.

La enhavo de la artikolo: Scienca intereso pri piĝin- kaj kreollingvoj ekde la Dua Mondmilito; Diversaj tipoj de kreollingvoj; Franca lingvo, Piĝinaj lingvoj; Artefaritaj internaciaj lingvoj - diversaj ekzemploj: Maimieux, Dalgarno, Leibniz, Ronai k.a.; Volapuk kaj Esperanto k.a. Gramatiketo de Volapuk kaj Esperanto; Argumentoj por kaj kontraŭ planlingvoj; Basic English; Literaturo.

La aŭtoro havas sufiĉe grandan fakscion. Legante tiujn liniojn, oni eble venas al la kon-

kludo, ke temas pri resumo de la 408-paĝa libro "Internationale Plansprachen" (internaciaj planlingvoj) de Detlev BLANKE, Akademie-Eldonejo, Berlin, Germanio, ISSN 0138-550X.

Kopio de la artikolo estas havebla kontraŭ unu internacia respondkuponon ĉe: **Walter KLAG, Rudolfinegrasse 8/11, A-1190 Wien, Aŭstrio.**

LA OFICIALAJ LINGVOJ DE LA INTERNACIAJ ORGANIZOJ

En Fischer-Eldonejo, Germanio, en 1991 aperis libro "Internationale Organisationen" pri la internaciaj organizoj (IO). La aŭtoroj estas Mario von Baratta kaj Jan Ulrich Clauss; ISBN 3-596-10644-3.

La libro enhavas informojn pri ĉirkaŭ 250 ĉefe interŝtataj organizoj: Fondodato, celo, membroj, organoj, sidejo, laborlingvoj (LL), financado, aktivecoj, kunlaboraj organizoj ktp.

Jen statistiko pri la laborlingvoj: 72 internaciaj organizoj ne havas oficialan laborlingvon; 31 havas nur unu laborlingvon (18 la anglan, 10 la francan, 3 alian). 52 internaciaj organizoj havas du laborlingvojn, en 37 kazoj la anglan kaj francan. 27 havas tri laborlingvojn, 31 havas kvar, 14 havas kvin, 11 havas ses kaj 2 havas 7 laborlingvojn. "Gajninto" estas la Eŭropa Komunumo, kiu uzas ĝis 11 lingvojn, ekde antaŭnelonge ankaŭ la katalunan. Meznombro la internaciaj organizoj havas tri laborlingvojn.

La ok plej gravaj lingvoj estas: la angla (143 foje), la franca (134), la hispana (56), la germana (43), la araba (25), la rusa (24), la portugala (12) kaj la itala (11). 18 pliaj lingvoj estas ankaŭ oficialaj ĉe internaciaj organizoj.

La Eŭropa Komunumo disponas pri la plej granda lingvoservo de la mondo. Deĵoras 2500 tradukistoj kaj 3100 interpretistoj. La kostoj estas jare 1,4 miliardoj da ekuoj. Tiu aparato produktas ĉiujare 1 000 000 paĝojn. La oficiala organo da Eŭropa Komunumo aperas labortage kelkfoje, en ĉiuj naŭ oficialaj lingvoj.

BEL-aj Tagoj

La seminario de Bahaa Esperanto-Ligo (BEL), okazinta de la 5-a ĝis la 9-a de septembro k.j. en IEK-Pisanica allogis ĉ. 30 esperantistojn, inter kiuj la germanoj Bernhard Westerhoff, Annerget Meyer kaj Dieter Menke, Pierre Parini el Luksemburgio, Uschi Ley-Schmucki - svisino kaj Kelly Herndon - usonano, ambaŭ loĝantaj en Germanio.

La 6-an de septembro B. Westerhoff prelegis pri temo "La misio de Baha'u'llah". Li tuŝis la ĉefajn principojn de la Bahaa Kredo, kiel: unueco de la homaro, unueco de la religio kaj scienco, forlaso de religiaj, rasaj kaj politikaj antaŭjuĝoj, egalaj eblecoj por ekzistado, plena egalrajteco de viroj kaj virinoj, starigo de mondfederacio k.a. La saman vesperon per lumbildoj estis prezentita la temo "Unueco en Diversseco".

La sekvan tagon P. Parini daŭrigis la diskuton parolante pri la historio de la Bahaa Kredo. Ĝi devenas de Oriento kaj estas la plej juna el la sendependaj religioj de la mondo.

En majo 1844 en Ŝirazo, Persujo, Bab (Pordego) anoncas la baldaŭan aperon de la Mesaĝisto de Dio, atendata de ĉiuj popoloj de la mondo. Tiu estis Baha'u'llah, membro de unu el la elstaraj patriciaj

familioj de Persujo. En 1892 li forpasis kaj nomumis sian plejaĝan filon, alprenanta la titolon "Abdu'l-Baha" ("Servanto de Baha") unusola rajtigita interpretanto de Bahaaj instruoj. Post lia forpaso en 1921 la Bahaa religio eniris novan etapon de sia historio. De 1963 la sorto de la Internacia Bahaa Komunumo estas gvidata de Domo de Justeco. Ĝi troviĝas en Hajfo, Israelo, kie troviĝas ankaŭ la tombo de Bab. Nuntempe ĉ. kvar milionoj da bahaanoj loĝas en 166 sendependaj landoj kaj 48 teritorioj.

Post la prelego "La misio de Baha'u'llah", okazinta en ambaŭ tagoj, la partoprenantoj laborgrupe pri-traktis diversflanke tiun temon.

La 8-an de septembro A. Meyer parolis filozofie pri "Diversaj aspektoj de Bahaismo", post kio diskutronde oni interpretis la temon.

En la programo de la BELaj Tagoj okazis ankaŭ ekskursoj al Smoljan, al najbaraj vilaĝoj, Interkona Vesperto, Unueca Festo k.a. Por la bona pasigo en Pisanica kontribuis ankaŭ la bona suna vetero kaj beleĝa naturo de Rodopi-montaro, kiu ĉarmis la eksterlandanojn.

Rumjana GEORGIEVA

UNU DEMANDO - TRI RESPONDOJ

Intervjuo kun Bernhard WESTERHOFF, Pierre PARINI kaj Dieter MENKE

BE: *Kiam kaj kiel vi iĝis bahaanoj kaj kio ŝanĝiĝis en via vivo post tio?*

P.P.: Antaŭ 20 jaroj, kiam mi estis 17-jara, mi estis kun amikoj en kafejo. Tie mi ekbabilis kun du virinoj el Usono kaj Persujo. Ili diris, ke venis por viziti bahaanojn. Mi ekinteresiĝis pri tiu religio kaj donis mian adreson al ili. Poste la bahaanoj el mia urbo invitis min ĉeesti la kunvenojn. Post jaro kaj duono mi jam estis konvinkita ano de la Bahaa Kredo.

Por mi estas malfacile imagi kia estus mia vivo, se mi ne ekonus Bahaismon, ĉar ĝi donas respondon al multaj demandoj kaj konstante evoluas de tiam mia koncepto pri ĝi. Antaŭe mi estis katoliko. Poste, dank' al Bahaismo mi trovis solvon al multaj sociaj kaj religiaj problemoj kaj profundan konon pri aliaj religioj.

B.W.: Antaŭ 5-6 jaroj mi okupis min pri sociaj kaj politikaj preblemoj. Tiutempe, kiam komenciĝis mia studado de sociologio, mi konatiĝis kun bahaismo. Ĝi donas certan, superan vidpunkton por kompreni diversajn politikajn sistemojn kaj pri la mondo ĝenerale. Fine, post ampleksa studado de la bahaaj instruoj, mi konvinkiĝis pri ili. Tiuj instruoj tamen ne nur komprenigas sociopolitikajn problemojn, sed ankaŭ montras vojon al atingo de ĝoja interna paco, ili respondas ankaŭ la spiritaĵoj kaj mistikajn bezonojn de la homo.

D.M.: Antaŭ 9 jaroj mi kun la familio faris mallongan ferion dum Paska semajno en iu malgranda urbo. En la junulgastejo, kie ni estis loĝigitaj, la dommastrino sciigis al ni: "La domo hodiaŭ

estas tute por vi, sed morgaŭ venos bahaanoj." La sekvan tagon tiuj bahaanoj invitis nin partopreni iliajn kunvenojn. Iu donacis al mia filino la libron "Baha'u'llah kaj la nova epoko". Poste hejme ni tralegis ĝin kaj ekkontaktis kun bahaanoj en nia urbo. Ĉu io ŝanĝiĝis en mia vivo? Jes, nun mi pli facile solvas la problemojn, eĉ multaj tiaj malaperis.

BE: *Ĉu diferencas la ĉiutagaĵo de bahaano kaj nebahaa?*

P.P.: Mi strebas akurate plenumi ĉiujn miajn devojn kaj konsideri la principojn de bahaismo, sed idealan vivmanieron malfacile eblas atingi.

D.M.: Ne estas grava diferenco inter mia antaŭa kaj nuna vivmaniero.

B.W.: Mi klopodas realigi idealojn en mia propra vivo kaj ĝenerale mi kiel bahaano estas pli aktiva en la socia vivo.

BE: *Via koncepto pri la interrilato inter la viro kaj la virino en la familio?*

D.M.: Post la akcepto de Bahaa Kredo mi kaj mia edzino akiris alian konsciencon pri la komuna vivo, eĉ speciale ni laboris por tio. Ni partoprenis grupon, en kiu trejnas sin geedzaj paroj por evoluigi kaŝitajn potencialojn. Nia rilato pliprofondiĝis kaj ekintensiĝis ĉiurilate.

B.W. kaj P.P.: Ni rekonas la egalrajtecon kaj egalvalorecon inter la edzo kaj edzino.

BE: *Ĉu vi propagandas la bahaismon aŭ nur vi mem perfektigas vin?*

P.P.: Bahaismo diras, ke ĉiu ano devas propagandi, sed ne al-

trudi, kaj samtempe mem pliprofondiĝi en la konoj. Se la homo havas altan celon, la problemoj ne aspektas tiel gravaj.

B.W.: Ni disvastigas la sciigon pri la nova profeto kaj instruoj, kiujn ni konsideras esencaj por solvi la aktualajn mondajn problemojn. Ekzemple estas eterna problemo de la homaro trovi harmonion inter la unuopaj kaj la komunaj deziroj. Baha'u'llah i.a. instruas ekzemplan modelon por grupa decidado bazitan sur la strebo al interkonsento, kiu garantias pacan kaj bonefikan konfliktsolvadon.

D.M.: Bahaismo taŭgas forigi problemojn de la nuna tempo kaj pli facile solvi ilin. Mi ĝojus, se la homoj komprenos tion.

BE: *Ĉu bahaismo entenas ideon pri sana vivmaniero?*

B.W.: Jes, en la libro "Baha'u'llah kaj la nova epoko" estas ĉapitro "Sano kaj kuracado" kiu entenas la bahaajn instruojn pri la homa sano. Nia korpa sano estas ligita kun la sano mensa, morala kaj spirita. Oni ne malpermesas bestodevenan nutraĵon. Tamen Abdul-Baha diras, ke la fruktoj kaj grenoj estos la nutraĵo de la estonteco. La uzado de narkotajoj kaj alkoholaĵoj, escepte de kuraciloj en malsano, estas severe malpermesita de Baha'u'llah.

BE: *Ĉu laŭ vi la seminario sukcesis?*

B.W.: Jes, ĝi estas sukcesa, ĉar ni konigis al aliaj nian kredon. Venontan jaron printempe en Kaunas okazos la sekva kunveno de BEL kaj mi esperas, ke ĝi ankoraŭ efikos pli pozitive por Esperanto.

Bulgara Esperantisto

MONATA ORGANO DE BEA

- interesa, varia, riĉa enhavo; ilustrita per bonkvalitaj fotoj kaj grafikaĵoj.
- konstantaj rubrikoj: "Esperantologio", "Originala verkaro", "Lingvaj demandoj", "Juna esperantisto", "Verdaj steletoj", "Enlanda movado", "Deziras korespondi", "Distroj" k.a.
- legantoj en pli ol 51 landoj.

Jarabono: 36 levoj, 32 ned. gld. aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Libroservo de UEA (kodo - prsp-r), poŝtfilioj en Bulgario kaj ĉe perantoj en multaj landoj.

Petu provexempleron ĉe la Redakcio de "BE".

